

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 617 (4)

Aprilo 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Antaŭkongreso en Parizo



Parizo: Baziliko La Sacré Coeur.
La bela urbo de nia oficiala Antaŭkongreso.



ESPERANTO

Aprilo 1957

Revuo Internacia

N-ro 617 (4)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi
respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon
(vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represajon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chia-
brera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri
financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O,
Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Nia atuto	53
Ĉu sufiĉas varbadi?	53
La uzo de Esperanto en la scienco	54
La malamiko. B. Trudiĉ	55
Novembro. E. Dondi	57
La bovo. H. Jennings	58
Gabriela Mistral	62
Tra la romaj postsignoj en Provenco	64
Rubrikoj	
CED	60

APO	60
La internaciaj konkursoj	61
Niaj konkursoj	63
La Juna Vivo	65
Tra la mondo	66
Esperantista Vivo & Nekrologo	68
Radio-Babiloj	69
42a U.K.	70
Oficiala informilo	70
Radio	72

La ĉefa argumento kontraŭ nia afero, kiun oni ĉie renkontas tiel aplombe kiel erarege — por ne diri mensoge — dissemiata, estas kaj ĉiam estis tio, ke la lingvo Esperanto ne taŭgas por la literaturo.

Sinceraj homoj, kiuj pro nescio papage ripetadas tiun strangan, tute fantazian opinion, povas esti mirfrapitaj kaj konvinkitaj per montrado de eĉ nur kelkaj el la bonaj libroj eldonitaj en Esperanto. Kaj tiam ni aŭdas ilian konsternitan demandon, tiel naturan en nia epoko de potencpolitiko: „Kiu subvencias la eldonadon de tiuj libroj?” Estas eĉ pli mirige — ja konsternante — ke ni povas sincere respondi: „Neniu subvencias ĝin. La libroj estas normalaj varoj, normale aĉetataj de normala publiko.”

Nia literaturo estas nia plej grava atuto. Ĝi konsternas niajn malamikojn, ĝi impresas la indiferentulojn. Kaj ĝi riĉigas nian propran spiritan kaj kulturan vivon.

Pli precize, ĝi riĉigas tiujn el ni, kiuj ĝin utiligas. Ĉu vi jam turnis dum momento viajn pensojn al la granda merito de niaj eldonistoj? Ĉu vi prezentis al vi la grandan utilon, kiun ili alportas al nia afero — kaj aliflanke la sindonan riskemon laŭ kiu ili prenas sur sin la fincan ŝarĝon de Esperanto-eldonaĵo? Ankaŭ niaj eldonistoj estas idealismaj homoj. Per sia agado ili helpas la movadon, kaj ĝenas ilin precipe nur tio, ke multegaj gravaj kaj atentindaj manuskriptoj kuŝas neeldonitaj kaj verŝajne ne baldaŭ eldonotaj.

Kulpas, kompreneble, parte la diseco de nia publiko. La transsendo de valuto de unu lando al alia estas malhelpata aŭ neebla. Jes, tio estas vera. Kaj tamen: se UEA sola (kaj ĝi reprezentas nur onon de la vere aktivaj esperantistoj) havas 24,500 membrojn — kial bona libro ne povas rapide disvendiĝi en 5,000 ekzempleroj? Aŭ eĉ en 3,000 ekzempleroj — cifero, kiu instigus la eldonadon de ĉiam pli bonaj volumoj? Niaj libroj ne estas pli multkostaj ol nacilingvaj libroj (malgraŭ la multege malpli grandaj eldonnombroj): tamen, ĉu ĉiu esperantisto, kiu nomas sin „aktiva”, aĉetas eĉ meznombro po 5 librojn jare? Kaj se ne, kial ne?

„Esperanto”, kaj pluraj aliaj gazetoj, aparte klopodas doni al siaj legantoj fidindajn recenzojn pri la aperantaj verkoj. Aperas verkoj laŭ ĉies gusto; krom tio, aperas libroj kiuj estas nepre *prestigaj* — kiuj meritas aĉeton *ankaŭ pro la reputacio, kiun ili alportas al nia afero*. Se nia afero estas por ni kara kaj serioza, ni havas la devon ankaŭ subteni niajn eldonistojn kaj niajn verkistojn, ĉar per tio ni rekte helpas la progreson de tiu nia afero. Nia literaturo estas nia atuto; ĝi estas nia gloro kaj nia monumento. Ni dediĉu al ĝi iom pli da atento.

La samo validas pri nia gazetaro. Kun kia fiero ni diras al niaj varbotoj, ke „proksimume cent gazetoj regule aperas en la Internacia Lingvo”! Kaj tio estas vera. Tamen ni eble ne rememoras, per kiaj klopodoj, baraktoj kaj oferoj ebligas tion al ni la eldonantoj; ni eble forgesas la eternan optimismon de tiuj, kiuj paŝas sur la lokon de iu, kies fortoj elĉerpiĝis, kaj proponas al ni novan altvaloran revuon. Ni eble tro pasive akceptas, rifuzante nian helpon per abonado laŭ niaj rimedoj. Ne ĉiu povas aboni ĉion. Sed ĉu vi estas certa, ke vi faris vian plejebonon?

Se vi estas homo, kiu *nenion* legas, kiun *nenio* interesas (eĉ ne la sukceso de Esperanto), vi eble rajtas diri, ke miaj vortoj ne koncernas vin. Sed tiukaze vi apenaŭ estus iĝinta esperantisto, vi certe ne finlegus tiun ĉi artikolon.

Se vi legis ĝis tiu ĉi punkto, mi esperas, ke vi pripensos miajn vortojn. Kaj ekagos.

William Auld

Necesas konstante aperigi la nomon „Esperanto” antaŭ la publiko, eĉ ne atendante sensaciajn rezultatojn. Ankaŭ necesas konservi la fruktojn de tiuj semoj, kaj mi scivolas, ĉu ni ĉiam faras tion.

La malnova demando traŝis min kun freŝa forto antaŭ pluraj tagoj, kiam mi renkontis iaman studentinon mian, kiu ne nur diligente studadis la lingvon, sed sufiĉe fervoris pri ĝi por ĉeesti du kongresojn. Ŝi tamen ne ĉeestis la lokan grupon dum du jaroj, kaj dum la konversacio evidentiĝis, malgraŭ ŝiaj ĝentilaj eŭfemismoj, ke la grupo kaj ne la lingvo forpelis ŝin — fakte, ŝi eĉ provis alian grupon antaŭ ol definitive rezigni pri Esperanto.

Individuajn perdojn ni povas — cetere, devas — atendi, sed la plendoj de tiu ĉi junulino eble klarigas, kial niaj perdoj estas fakte amasaj. Kiel ŝika sveltulino ŝi kompreneble ne deziras forsekiĝi, ne iom ĝuinte la vivon; sed ŝia ĉefa plendo ne estis la manko de grupaj baloj, k.s., sed la manko de bona Esperanto, kune kun la prefero de la tielnomataj esperantistoj paroli la nacian lingvon. La balbuta, malcerta Esperanta parolado, kiun ŝi trovis, sufokis ŝian propran evoluon tiom, ke la kongresoj estis por ŝi ne instigaj, sed seniluziigaj, ĉar ŝi hontis antaŭ la flua parolo de alilandaj kongresanoj.

Plej pensiga estis ŝia sento, ke la relative maljunaj grupanoj intence rezistis la emojn de la novicoj plikompetentiĝi. Se tiu sento estas ĝenerala, kiom utilas propagando, kiu ŝanĝos indiferentulojn en eventualajn malamikojn?

Estas ja vere, ke UEA kaj pluraj landaj asocioj dum la lastaj monatoj fondis aŭ kuraĝigis junulajn fakojn, kiuj jam ekmontras viglan agemon kaj entuziasmon. Tamen, ĉu ni povas esti certaj, ke tiu nova spirito jam sentiĝas en niaj lokaj grupoj?

La laboron de multaj povas detrui fuŝado de malmultaj.

J. F.

LA UZO DE ESPERANTO EN LA SCIENCO

Grava evento en la historio de la esperanta literaturo

Ĝis nun niaj sciencistoj publikigis kiel gastoj siajn traktaĵojn okaze kaj unuope en diversaj sciencaj fakaj revuoj, disa pionira laboro, kiu preskaŭ dronas en la inflacia torento de la hodiaŭa scienca revuliteraturo. Je la unua fojo estos, jam dum tiu ĉi jaro, eldonata granda internacia volumo da originalaj sciencaj traktaĵoj verkitaj en Esperanto, ampleksa publikigaĵo, volumo de ĉ. 250 paĝoj, en kiu la esperantistaj sciencistoj ne estos nur gastoj, petantaj lokon por sia lingvo en faka revuo nacilingva, sed mastroj, uzantaj Esperanton nature kaj samnivele kun aliaj kulturlingvoj.

La atento flanke de UNESKO al nia movado certe ne estas pure platona, la simpatio kreita en la koncernaj rondoj ekster nia movado pri nia lingvo povas esti nutrata nur se ni daŭre denove kaj denove pruvos nian rajton de ekzistado per praktikaj rezultoj de ĝenerala intereso. Nur per serioza dokumentado, kiu montras, ke la apliko de Esperanto okazas sur la sama nivelo kiel en aliaj rekonitaj kulturlingvoj, ni povas atingi la kreskantan praktikan akcepton, kiu estas la sola vojo, kiu kondukas al la meritita venko de nia lingvo. Sole tia serioza dokumentado povas malhelpi la ripete revenantan aperadon de la fantomoj de teoriaj diskutoj pri la formo de internacia lingvo tiel fremdaj al la reala vivo. La klopodo por aperigo de la menciita volumo de ISAE estas tiel gravega, ke ĉiuj, kiuj decide volas subteni la progresigon de Esperanto en la internacia vivo de scienco, kulturo kaj edukado, mem devas partopreni persone per sia influo inter lokaj esperantistoj kaj per sia persona kontribuo, mendante la priparolatan jubilean libron, al kiu oni donis la nomon SCIENCAJ STUDOJ.

La asocio faris al la subskribinto la honoron peti lin redakti la volumon. Sekve mi dum la pasinta vintro havis okazon enprofundiĝi en tiu ĉi por nia literaturo unika materialo. Kaj mi povas promesi, ke la libro, kiu nun kreiĝas, estos interesa por ĉiu esperantisto ĉu sciencisto-akademiulo aŭ ne. Estas vere, ke ĝi enhavos plurajn traktaĵojn tiel alte sciencajn, ke nur nemultaj specialistoj kapablos plene kompreni ilin, sed aliflanke tiuj specialaĵoj tiel elokvente atestas pri la kapablo de nia lingvo por plej postulaj taskoj kaj pri la seriozeco de la esperanta kulturvivo, ke sole pro tio ĉi la nespecialisto klopodos kompreneti ĝian fakan signifon, kaj plue li kun fiero montros tiajn lokojn en la volumo al tiu, kiu dubas pri nia lingvo kaj movado. Sed apud tiaj specialecaj traktaĵoj troviĝas aliaj ĉapitroj, kiuj estas bone kompreneblaj de ĉiu ordinare klera homo, t.e. de ĉiu mezsperta esperantisto, kaj kiu alportas senpere interesan kaj ĝuigan legaĵon. Multaj el la kontribuintoj estas mondkonataj sciencistoj, inter kiuj pluraj membroj

de sciencaj Akademioj. Inter la kunlaborantoj troviĝas pluraj el la plej bonaj plumoj de nia lingvo.

En Parto Humanisma verkis pri lingvistikaj-filologiaj problemoj *Collinson*, *Waringhien*, *Privat*, *Ebbe Vilborg*, *Manders*, *Setälä* kaj *Wüster*, pri historiaj-folkloraj temoj kontribuas *Elio Migliorino*, *Régulo Pérez*, pri psikologiaj demandoj detalingas *Adcock* kaj *Marjorie Boulton* kaj *Ivo Lapenna* prezentas analizon de grava temo el la internacia juro.

En Parto Matematika-Naturscienca troviĝas astronomiaj kontribuadoj de *Vaisälä*, *Popovic* kaj *Kustaanheimo* kaj matematika traktaĵo de la franca scienca Akademiano *Fréchet*. Temoj de fiziko, kemio kaj biokemio estas pritraktataj de *Hugo Sirk*, *Nijveld*, *Hartman*, *Kawamura*, *Sugimura* kaj *E. Jouis*, dum el la laborkampo de botaniko kaj hortikulturo estas studaĵoj faritaj de *Ralph A. Lewin*, *Makkink*, *Neergaard* kaj *Klang*, kiujn siavice sekvas el la kampoj de zoologio kaj medicino *Stop-Bowitz*, la japanaj univ. rektoro *Nishi* kaj hospitala vicedirektoro *Shinoda*, la argentina zoologo *Balech*, la itala univ. rektoro *Canuto*. Kaj ankoraŭ kelkaj kontribuadoj de elstaraj sciencistoj estas atendataj, antaŭ ol ni devas fermi la redaktadon.

Per la propraj fortoj de la Esperanto-movado tiu ĉi scienca verko estos eldonata. Eksperimento ne antaŭe farita. Ĝia esperata sukceso povos fariĝi bazo por plua scienca publikigado en nia lingvo. Ĉiukaze tiu ĉi volumo havos, pri tio mi estas konvinkita, sian apartan valoron kiel speco de *Krestomatio de sciencaj traktaĵoj*, kiu pro la neordinara pozicio de la kunlaborantaro formos modelan specimenon el la scienca literaturo el tiu estonteco, pri kiu ni devas pli ol revii, aŭtoritatecan specimenon de la scienca Esperanto.

Ĉiu esperantisto povas grave helpi al la sukceso de tiu ĉi klopodado per tuja mendo de ekzemplero kaj per aktiva varbado de aliaj antaŭmendantoj. La mendo kaj la antaŭpago (favorprezo konsiderinde plialtigota post la aperigo) estu sendataj al s-ro farm.kand. *Vagn Jørgensen*, Martinus Rasmussensgade 21, Nyborg, Danujo, poŝtkonto 215 12, kiel eble plej baldaŭ. Se tia transpago estas tro malfacila el via lando, oni povas ankaŭ sendi la monon al la landaj perantoj de Int. Scienca Asocio Esperantista (bonvolu trovi la adresojn de la landaj perantoj en la jarlibro de UEA sub la nomita asocio).

Daŭre kaj ripete nia lingvo estas pesata — kaj baldaŭ pro nova iniciato denove estos pesata — de kritikemaj intelektuloj, kiujn ni nur povas konvinki per faktoj. Tiajn faktojn ni mem devas krei.

Paul Neergaard

*) La verko Sciencaj Studoj kostas 18 dan. kr. aŭ 18 brit. ŝil. aŭ egalvaloro (36 steloj).

La Malamiko

Komedieto en unu akto

de

Božidar Trudić

PERSONOJ:

Edmondo Milton, funkciulo en la Ministerio de klerigo.

Eva Milton, lia edzino.

Petro Keli, prezidanto de la Nacia Esperanto-Ligo.

La Poŝtisto.

Ana, servistino.

La komentariisto.

La Komentariistino.

La agado okazas inter la Bolonja kaj Kopenhaga kongresoj.

(Sur la antaŭscenejo ambaŭflanke troviĝas du altaj seĝoj kun la ŝtuparoj.)

La komentariisto (en speciala blanka vestaĵo kovrita per multnombraj verdaj steloj kaj steletoj, venas elinterne antaŭ la kurtenon). — Nur ne esperu ke mi nun ekkantos la prologon el „La Pajacoj”! Ne. Mi estas nur komentariisto, interpretisto. „Kial ni bezonas interpretiston?” — eble demandas vi. „Ni ja ĉiuj komprenas Esperanton!” — Jes, vi ĉiuj komprenas Esperanton, sed, bedaŭrinde, unu el niaj ĉefaj personoj ne komprenas ĝin. Ĉar, se li komprenus, li ne povus esti malamiko, tio ja estas klara, ĉu ne? — Do, nia respektinda sinjoro Edmondo Milton, kvankam grava kaj instruita persono, tamen estas tiom malnovmoda kaj absorbita per siaj laboroj, ke li neniam havis tempon — aŭ volon — interesiĝi pri nia lingvo. Malgraŭ tio ke li ne konis la aferon, li fariĝis malamiko de Esperanto, simile al tiu fama lingvisto dum nia batalo en Montevideo... — Lia edzino Eva, kontraŭe, estas entuziasmigita esperantistino kaj eĉ sekretariino de la Ligo. Ŝi tiel vigle kaj sindone laboras en la movado kun la prezidanto de la Ligo, ke ŝia edzo, nature, jam komencis... — Sed ne! Mi ne daŭrigos la rakonton. Vi deziras vidi la teatraĵon, ne aŭskulti la rakonton. Mi nur volis klarigi al vi ke mia ĉeesto ĉi tie estas necesa. — Nun ni povas komenci. He! teknikistoj, levu la kurtenon! (Ekiras al sia seĝo dekstre.)

La komentariistino (simile vestita, venas de la alia flanko). — Haltu! Ĉu vi intencas komenci sen mi?

La komentariisto (mire). — Kiu ja vi estas?

La komentariistino. — Mi estas komentariistino, interpretistino.

La komentariisto. — Kial ni, al diablo, bezonus vin?

La komentariistino. — Sed por interpreti vortojn de Eva!

La komentariisto (moke). — De Eva? Ŝi ja bonege parolas Esperanton!

La komentariistino. — Ne estu tiel stulta! Mi scias ke ŝi parolas, sed kiamaniere ŝi interparolos kun sia edzo? Se nacilingve, tiam nia estimata publiko...

La komentariisto (ŝtrapas sian ŝtrunton). — Kia stultulo! Mi eĉ ne pensis pri tiu afero!... Do, bone, mi konsentas. Rapide! Prenu vian lokon tie maldekstre!... Nur ne babilu tro multe! Mi scias ke vi, virinoj... (Turnas sin al la scenejo.) — Ĉio en ordo! Nun levu la kurtenon! (Ili ambaŭ supreniras la ŝtuparojn kaj sidiĝas en siajn seĝojn. Dume la kurteno malrapide leviĝas.)

(La scenejo prezentas du apartajn ĉambrojn: maldekstre la laborkabineto de Milton, dekstre la taga ĉambro de lia edzino. Inter ili granda malfermita pordo. Necesa bela meblaro. En la kabineto telefono.)

Eva (sidante ĉe sia skribtablo kaj foliumante diversajn esperantaĵojn). — Kia domaĝo ke mi ne povis ĉeesti la kongreson en Bolonjo! Kiaj interesaj prelegoj! Kia bela kulturaranĝo! Ne povi vidi „La Revizoron” en Esperanto, tio ja estas nepardonebla!... Kaj ĉio ĉi nur pro mia edzo, kiu ne ŝatas Esperanton! — Li estas kontraŭulo..., li estas... malamiko!... (Paŭzo.) — Kaj tiu bela ideo pri enkonduko de Esperanto en lernejojn... La prezidanto de la Ligo, mi kaj ĉiuj komitatanoj, ĉiuj ni klopodas senfine, sed io malhelpas... Ia nevidebla obstaklo baras la vojon... Sur sia posteno de funkciulo en la Ministerio, Edmondo povus helpi la aferon, sed li ne volas... Kion fari por venki lian obstinon?... (Enpensiĝas.)

La komentariistino. — Kompatinda Eva!... Ŝi nun cerbumas pri manieroj... Ne, ne, viaj planoj estas malbonaj!... Disiĝo? Lasu tiun stultan ideon! La aferon oni povas aranĝi ankaŭ sen tio... Kio? Ŝajnigi memmortigon? — Vi ridigas min!... Ĉu ni vivas en romantika epoko?!...

La komentariisto (malpacience). — Ĉu mi ne diris al vi ne babili multe! Kion vi nun interpretas? Ĉu vi ne vidas ke ŝi silentas?

La komentariistino. — Mi interpretas ŝiajn pensojn. Ni, virinoj, kapablas legi pensojn unuj de aliaj...

La komentariisto (grumbas interden-te).

La komentariistino (kvazaŭ voĉo de la konscienco). — Ne, ne, Eva! Ĉiuj viaj projektoj estas nerealaj!... Mi miras ke vi povis forgesi la ĉiopovan armilon de la virino!... La plej bona rimedo por atingi de la celo... estas — ĵaluzo, Eva!... Ĵaluzo, ĵaluzo, ĵaluzo!... (Ŝia voĉo transiras en flustradon.)

(Aŭdiĝas ŝtrapo sur la pordo.)

Eva (elreviĝas). — Jes?

Ana (enirante direktas sin mute al Eva, ŝajnigante paroladon.)

La komentariistino (interpretas la paroladon de Ana). — Sinjorino, la maljuna poŝtisto denove insistas persone transdoni al vi poŝtaĵojn.

La komentariisto. — Jen, ŝi jam ekfunkciis en sia rolo de interpretistino!

La komentariistino (interpretas). — Sed lasu lin eniri! Ĉu mi ne ordonis al vi...?

La komentariisto (por si mem). — Jes, vi ordonis al Ana ĉiam enkonduki la poŝtiston, sed kion diras pri tio... —

La komentariistino (interpretas). — Jes, sinjorino, sed vi bone scias ke la sinjoro ne toleras tion kaj ke li pasintfoje multe koleris kaj eĉ mallaŭdis min.

La komentariisto (al la publiko). — Kaj ĉu vi scias kial li ne toleras tiun poŝtiston? Nu, tuj vi vidos!

La komentariistino (anstataŭ Eva). — Nur vi lasu tiun simpatian bonulon!

(Ana eliras skuante la ŝultrojn. Post tempeto eniras LA POŝTISTO malgranda kaj maldika, vigla maljunuleto kun blankaj lipharoj kaj kun granda verda stelo sur la brusto.)

La poŝtisto (vigle kaj gaje). — Bonan tagon, samideanino Eva!

Jen denove la poŝtist' sindona

Kun sendaĵ' abunda, fruktodona!

Eva (ridante). — Bonan tagon, oĉjo poŝtisto! Ĉiam gaja kaj vigla, ĉu?

La Poŝtisto. —

Jes, mi ĉiam estis tia tipo:

Bonhumoro — mia ĉefprincipo!

Eva. — Tiel flue paroli en versoj! Vi ja povus libere partopreni en la Belarta Konkurso de UEA!

La poŝtisto (kvazaŭ ofendite). —

Mi ja scias mian ĝustan lokon.

Lasu vian priridon kaj mokon!

Eva. —

Nu, bone, bone. Ne koleru! Kion do vi alportas al mi?

La poŝtisto (aŝable kaj prete). —

Jen gazetoj, leteroj, poŝtkartoj,

El diversaj, belegaj mondpartoj.

(Prenas el la sako opajn poŝtaĵojn kaj transdonas ilin al Eva.)

Jen „Heroldo”, la nova numero, la plej grava gazeto de l' Tero!...

Kaj ĉi tio? — La nova „Praktiko”, mondpopola kaj sen politiko!...

Kaj „Revuo” jen nun ĉiopova, sed pli juna kaj en vesto nova!...

Kaj jen, fine, el sako-abismo nun aperas eĉ „La Norda Prismo”!...

Eva (ridas). — Dankon, dankon... Kaj la aliaj gazetoj?...

La poŝtisto. —

La aliaj iras sian vojon,

ili venos ja venontan fojon!...

Sed ne perdu vi viajn esperojn, —

mi alportas eĉ kelkajn leterojn!...

(Elprenas unu leteron.) —

Vidu tiun de roza koloro,

belaspekta (*flaras*), de revo-odoro!

Certe venas — ho, kia surprizo! —

ĝuste ĝi el dia paradizo!

Eva (esploras la stampilon). — Preskaŭ vi pravas. Ĝi venas el Santiago de Cuba.

La poŝtisto (daŭrigas la elprenadon).

Jen letero el fora Irano...

Jen la karto el stranga Libano...

Argentino... Borneo... Libio...

Alĝerio... Islando... Ĉilio...

Hispanujo... Svislando... Usono...

Gvatemalo... Turkujo... Cejlono...

Kun Danlando de l' rikolto fino...

Ĝis revido, kara sinjorino!...

Eva (ĉiam ridante). — Ĝis revido, kara onketo! Vere abunda rikolto! Koran dankon!

La poŝtisto (en la pordo).

Ne forgesu nur pri kio temas:

Se kun ardo kaj fervoro semas

verdstelanoj — geesperantistoj,

tiam bonan rikolton ja emas

porti al vi verdstelaj poŝtistoj!

(Eliras.)

Eva (Kun plenmano da poŝtaĵoj iras al la sofo, sidiĝas kaj komencas trarigardi la materialon). — Vere sprita kaj simpatia homo! Li tiel distris min, ke mi preskaŭ forgesis miajn zorgojn... (Ŝi enprofundiĝas en la legadon de la „paradiza“ letero.)

La komentariisto. — Jes, simpatia homo tiu poŝtisto. Sed ĝuste pro tio via edzo ne toleras lin, ĉar li estas esperantisto!

La komentariistino. — Ni provos aranĝi la aferon. — Jen bona ideo, Eva! Letero, ama letero!... Ĵaluzo, ĵaluzo, ĵaluzo!...

Eva (finleginte la leteron). — Malfeŝa amiko!... Adoranto el mia fraŭlina tempo... Li ankoraŭ ne konsolis sin... (*Revas. Paŭzo. Subite, ŝia vizaĝo heliĝas. Ŝi ekstaras ekscitite, frapante la manojn.*) — Brave! Brila ideo!... Ĝi devas sukces!... Petro helpas min realigi la planon... (*Paŝante tra la ĉambro rigardas sian manhorloĝon.*) — La dekunua... Petro devas veni ĉiumomente... Li certe konsentos ludi la rolon...

Ana (frapas kaj eniras. Mute komunikas ion.)

La komentariistino (anstataŭ Ana). — Sinjorino, sinjoro Petro Keli atendas en la antaŭĉambro.

Eva (malpacience elkuras eksteren.)

Ana (strange akompanas ŝin per la rigardo.)

La komentariistino (anstataŭ Ana). — Kio ja okazas kun mia sinjorino?! Kia urĝo!... Io ne estas en ordo!... Sinjoro Milton tute pravas ĉar li ne simpatias tiujn esperantistojn!... Kiaj strangaj homoj!... Tiu maljunulaĉo, la poŝtisto!

... Li similas al kokvireto!... Kaj tiu prezidanto Keli... Kvankam li aspektas kiel tre eleganta kaj bonedukita homo, tamen, se mi estus ŝia edzo, mi malpermesus al li eniri tien ĉi!...

Eva (revenas kun Petro, gvidante lin per la mano). — Sidiĝu nur, mi klarigos al vi ĉion.

Petro (sidiĝas). — Kio okazis al vi? Vi ŝajnas tiom ekscitita ke...

Eva. — Silentu! Ne parolu! Aŭskultu!

Petro (obeeme). — Mi silentas. Mi ne parolas. Mi aŭskultas.

Eva. — Ĉu vi konsentas...?

Petro (rapide). — Mi konsentas pri ĉio!

Eva. — ...esti mia amanto?

Petro (konsternite gapas). — Esti... via...? Ĉu vi freneziĝis subite?

Eva. — Ne, mi estas tute normala kaj mi parolas serioze.

Petro. — Sed kion dirus via edzo se li ekscius!...

Eva. — Li eĉ devas ekscii!

Petro. — Kio? Li devas ekscii ke mi...? Nu, mi dankegas!

Eva (malpacience). — Mi vidas ke vi nenion komprenas! Mi ne intencas trompi mian edzon!

Petro. — Kial do vi bezonas amanton?!

Eva. — Tiu amanto devas esti nur ŝajna, fiktiva.

Petro. — Nu, bone. Klarigu al mi tiun vian projekton.

Eva. — Tuj. Kaj, mi komencos de la komenco.

Petro. — Dank' al Dio! Vi povis tuj fari tiel, kaj ne komenci de la fino!

(La sekvanta interparolado fluas tre vigle kaj rapide.)

Eva. — Vi scias ke al mia edzo ne plaĉas multe nia lingvo?

Petro. — Mi pli volonte dirus ke li rekte malŝatas ĝin.

Eva. — Alivorte ke li estas malamiko de Esperanto.

Petro. — Evidente, ĉar li ne subtenas nian aferon en sia Ministerio.

Eva. — Kaj ĉar li ne permesas al mi viziti niajn universalajn kongresojn.

Petro. — Nu, li certe tion ne permesas pro tute aliaj kaŭzoj, ne ĝuste pro Esperanto mem!

Eva. — Estu kiel ajn, li estas kaj restas malamiko de nia movado.

Petro. — Ŝajnas ke tio estas nerefutebla fakto.

Eva. — Pro tio mi firme decidis entrepreni energiajn paŝojn.

Petro. — En kio konsistus tiuj paŝoj?

Eva. — Devigi lin ellerni Esperanton! Li estas kontraŭulo, ĉar li, kvankam lingvisto laŭ fako, ne klopodis trastudi la lingvon. Ĉe multaj lingvistoj ekzistas antaŭjuĝoj, ke tielnomata „nenatura“ lingvo ne povas esti bona.

Petro. — Tion ni bedaŭrinde vidis en Montevideo. Sed kiamaniere devigi lin trastudi Esperanton?

Eva. — Li devas fariĝi ĵaluzo! Kaj vi devas helpi min en tiu entrepreno.

Petro. — Nun mi komencas kompreni. Kvankam tio povas esti malagrabla kaj

por vi kaj por mi, tamen... Nu, diru vian planon!

Eva. — Jen en kio konsistus tiu plano... (*Dum plua muta interparolado Petro ekbruligas cigaron.*)

La komentariistino. — Vi estas maljusta. Vi diras: „ŝi estas saĝa kaj ruza“, ... „ŝia plano sukcesos“... Vi forgesas ke mi sugestis al ŝi miajn proprajn pensojn.

La komentariisto. — Bone, bone. Ni ne disputos nun pri aŭtoraj rajtoj...

La komentariistino. — Mi volis nur diri...

La komentariisto. — Nun sufiĉas. Ĉu vi opinias ke ili havis sufiĉe da tempo por interkonsento?

La komentariistino. — Kial ne? En teatro, same kiel sur ekrano, ĉio estas ebla!

La komentariisto. — Do, ni daŭrigu la prezentadon!

Petro (leviĝas de sur la sofo kaj estingas la cigaron en la cindrujo). — Mi konsideras ke la plano estas bonega, kvankam iom riska. Estu singarda kaj ludu bone vian rolon, ... karulino mia! (*Ambaŭ ridas.*)

Eva. — Ne zorgu, ... karulo! — La afero estas urĝa. Rapidu! (*Akompanas Petron ĝis la pordo.*)

Petro (adiaŭas kaj eliras).

Eva (kontente frotas la manojn). — Mi esperas ke ĉio funkcios glate. Edmondo baldaŭ venos. Kaj se li renkontos Petron sur la strato?... Ne ĝenas... Eble estus eĉ pli bone!... Nun mi daŭrigu la legadon de la poŝtaĵoj. (*Sidiĝas kaj legas.*) — Ŝajnas ke Edmondo jam alvenis. (*Aŭskultas, poste malfermas la pordon. En la antaŭĉambro oni vidas Edmondon demetanta siajn surtuton kaj ĉapelon, kiujn prenas Ana.*)

La komentariistino (anstataŭ Eva). — Ĉu vi jam alvenis, Edmondo? Kiel la tempo rapide forpasas!...

Edmondo (eniras).

La komentariisto (anstataŭ Edmondo). — Jes, kara Eva, kiam oni ne enuiĝas, tiam la tempo rapide forpasas. Ĉu vi bone amuzis vin hejme?

Edmondo (ĉirkaŭprenas kaj kisas Eva).

La komentariistino. — Jes, mi ricevis multajn poŝtaĵojn preskaŭ el la tuta mondo.

La komentariisto (kvazaŭ indiferece). — Denove viaj esperantistoj? Se vi ne havas aliajn, pli gravajn aferojn... (*Edmondo flaras en la aero.*) — Vi havis ian vizitanton?

La komentariistino. — Vizitanton?... N-ne... Mi estis sola la tutan antaŭtagmezon...

Edmondo (rigardas ĉirkaŭen, aliras al la cindrujo kaj prenas la cigarrestaĵon).

La komentariisto. — Sola? Kaj kio estas tio ĉi? Vi fumis tiun ĉi cigaron?

Eva (ŝajnigas konfuzon).

La komentariistino. — Mi... e... vere... Cigaron?... Vi diras cigaron?... De kie venis nur tiu ĉi cigaro?...

La komentariisto (pli severe). — Eva! Vi ion kaŝas antaŭ mi! Kiu estis kun vi

LA BOVO

de H. Jennings

La lastaj radioj de la suno traboris la ruĝan pluvnebulon super la Amathola-montoj. En la bruna valo profunde sube, sur roka elstaraĵo brila je flamkoloraj alcooj, knabo staris, kriante: „Venu, Tuswa, venu! Yiza, inkabi yami! Woza-e-ké!”¹⁾

Bovo tiris sin malrapide super la randon de la monteto kaj senĝene moviĝis al la knabo; belega besto, kremkolora kun nigraj makuloj kaj larĝe apartigitaj kornoj, vera afrika bovo! La knabo kuris al ĝi, kriante kun granda severo: „Sentaŭgulo! kie vi estis? La aliaj bovoj estas ĉiuj en la bovejo kaj vi kaŝas vin en la fendego, por serĉi dolĉajn herbojn! Unu nokton ili prenos vin — aŭ ĉu vi kredas, ke vi ĉiam povos mortigi leopardojn, granda stultulo?”, kaj li frapetis la beston sur la frunto per la vergo kiun li portis. La bovo skuis la kapon kvazaŭ muŝo estus mordinta ĝin, kaj balais la areon per siaj potencaj kornoj.

„Ho, ĉu vi volas?” diris la knabo, kaj lasante fali la vergon, li ekkaptis la kornojn je la bazo. Kelkajn minutojn la du kune luktis, dum la besto intence bremsis sian grandan forton, ofte tamen levante alten super la tero la maldikan korpon de la knabo. „Ĉesu! Tio sufiĉas,” diris la knabo, ŝvitante, kaj per unu mano li komencis froti la grandan harkovritan fronton de la besto. Tuswa staris senmove, palpebrumante stulte per la ruĝaj okuloj. Tiam per rapida salto la knabo hisis sin sur ĝian masivan kolon kaj kliniĝis antaŭen ĝis lia vizaĝo tuŝis la silkecan felon. „Nun portu min hejmen,” li diris.

Tiel ili venis al la malgranda grupo de rondaj kabanoj sur la flanko de la monteto. Ofte la knabo devis laŭte malbeni, kiam la besto ŝajnis sin eraronta pri la vojo aŭ portis lin sub dornarbojn, kiuj skrapis lian dorson. Dum li pasis tra la vilaĝo, levante nubeton da polvo, grupo de vizitantoj rigardis kaj unu el ili diris: „Jen Jojo²⁾ kun Tuswa, la mortiginto de leopardo. Tiu vere estas bovo!” Lia patro observis lin, nenion dirante, sed Umnewethu, la pli aĝa frato, rigardis lin per subbrulantaj okuloj, Frato pli juna ne devus paroligi pri si, kaj li malamis la grandan bovon, kiun li mem neniam povis obeigi.

Jojo pasis antaŭen en la krepusko, ankoraŭ kaŭrante sur la bovo, sed vidante ĉion per unu rapida flankrigardo. Ĉi tiuj viroj estis venintaj, li sciis, por diskuti la geedziĝon de lia frato kaj Solekile³⁾. Li pensis pri Solekile. Rekta kiel lanco, unu manon sur la kape portata poto kaj la alian sur la balanciĝantaj koksoj, stulte subridante ŝi iris preter la junaj viroj sen rigardo al ili. Sed ili longe rigardis ŝin kaj interne moliĝis kiel kampmelono dum la vintro. Mirinde! kaj ŝi estis nur


knabino kaj ĉe ŝia naskiĝo oni nomis ŝin Solekile. Li malsupreglitis de la bovo kaj flanken tiris la riglilojn de la bovejo. „Eniru!” li diris, frapante ĝin sur la postaĵo, kaj li rigardis ĝin enkurantan kaj disigantan la aliajn bovojn pro nura malico.

Jojo staris apud la pordo de la bovejo, rigardante la bovojn. Tiam li komencis kalkuli per la fingroj la bovojn plenkreskajn. Unu mano, jen kvin; du manoj, jen dek la blankuloj ne estis lasintaj multajn — kaj kompreneble Tuswa. Dekunu. Tio sufiĉas por la filino de plebano, sed Solekile estas la filino de vilaĝestro. Ili postulos pli. Almenaŭ dekkvin, li pensis kun subita sensarĝiĝo de koro. Li fermis la pordon per la tiucele metitaj dornarboj; sed kuraĝa estus la ŝakalo aŭ la hieno kiu volus eniri en la bovejon, dum Tuswa ĉeestus! Tiu bovo valoras kvin bovojn ordinarajn. Jojo eklevis la kapon. La penso venis al li kvazaŭ frapo: se ili kalkulus tiamaniere? Li perdus Tuswa'n. Eĉ vilaĝestro donus sian filinon kontraŭ Tuswa, la famekonata bovo.

Li reiris korpremite. Lia patrino insultis lin pro malfruo, sed donis al li abunde da *phuthu*⁴⁾ kaj *maas*⁵⁾. Sed li ne povis manĝi. Ilia ĉiam malsata hundo, apenaŭ kredante je sia bonŝanco, rabis pecon post peco, sen riproĉo. Jojo foriris silente al la kabano de la knaboj por dormi.

Sed la dormo ne venis. Liaj pensoj daŭre kuris al Tuswa: li kaj Tuswa kuŝantaj kune en la pajlo kiam ambaŭ apenaŭ scipovis marŝi; kreskantaj kaj konkure provante inter si la fortecon dum la jaroj pasis.

Subite li povis vidi denove la krutejon en la Amathola-montoj, kie pasintjare ili kaŝis la bovojn antaŭ la blankuloj ... ĝian malsekecon kaj la verdan mallumon ..., la arbojn kovritajn per likeno, de kiuj longaj rampbranĉoj atingis la teron. Kiom li timis kaj volis kuri reen al la sekvantaj viroj. Tiam la leopardo eksaltis. Ŝiaj idoj estis tie kaŝitaj kaj ŝi kredis sin kaptota. Li povis aŭdi denove la teruran muĝon kaj vidi la nigre-makulan korpon flugantan tra la aero. Tiam liaj genuoj senfortiĝis kaj li falis vizaĝaltere. Kiam li levis la kapon, Tuswa estis finanta kornumi ŝin ĝismorte. Tiam la bovo rektiĝis, skuis el la okuloj la sangon tien



ŝprucintan kaj en sia kutima maniero rigardis lin. La postan momenton la viroj alkuris, svingante siajn lancojn kaj bastonojn. Vidante la mortintan leopardon, ili ekkriis kaj proponis al lia patro multajn bovojn por Tuswa... dek, dekkvin... Kaj nun ili deziris dekkvin bovojn por Solekile, li pensis, ekstremante. Tiu knabino! Sed ili ne havos Tuswa'n! Li prenos lin kaj kaŝos malproksime... laŭ la longa vojo..., se li nur kuraĝos...

Li estis preskaŭ endormiĝinta, kiam li aŭdis iun levi la maton ĉe la enirejo, kaj lia frato eniris. Li kuŝis senmove, preskaŭ atendante batadon post tio, kion la viroj diris dum la preteriro. Sed lia frato iris rekte al sia dorm-mato. Estis tamen evidente, ke ankaŭ li ne povis dormi. Jojo povis aŭdi lin senĉese turniĝanta sur la mato, kaj nun tute sendorma kaj malfeliĉa, li kuŝis atendante kaj aŭskultante.

Tiam la knabo aŭdis susuron en la kabano kaj vidis sian fraton rampi tra la malalta enirejo. Li aŭdis lin, kiel li flustris kun aliaj junuloj ekstere, kaj kvankam li ne aŭdis la vortojn, li sciis, ke ili estas ekirontaj por rabi la bovojn de la blankuloj. Tuj kiam iliaj ŝtelpaŝoj ne estis plu aŭdeblaj, li elrampis kaj iris al la loko kie troviĝis Tuswa. Li frotis ĝian malsekan nazon per unu mano, kaj ĝi blovis varman, malsekan aeron en lian vizaĝon. Tiam senbrue, por ne maltrankviligi la ceterajn bovojn, li elirigis ĝin el la bovejo kaj ekiris en la nokton.

Dum ili iris stumblante tra la mallumo, gufo ululis super lia kapo, kaj fore li aŭdis la funebran kriaĉon de ŝakalo. La knabo ektemis. Subite li konsciis pri la danĝeroj de la vojo, memorante la timigajn rakontojn kiujn maljunuloj vespere rakontas: pri la senvizaĝaj *amadlozi*, la vagantaj fantomoj de la mortintoj; pri la sorfistoj kiuj vagas super la montoj en la formo de hienoj; pri la dikkorpa, vila *Tikoloshe*, kiu venas el malhelaj akvofontoj kaj sidiĝas sur la ŝultro, ĝis oni senesperigite ĵetas sin en la akvon el kiu ĝi venis. Tiam li rigardis la majestatan formon de la peze amblante bovo: Tuswa, kiu mortigis leopardon, povos bone alfronti tiujn! Sed li devas savi ĝin de la Abelungu, la blankuloj, kiam iliaj bovoj estas rabitaj, venas kun ĉevaloj kaj pafiloj kaj prenas ĉion.

Tri noktojn ili tiel iris sian malfacilan vojon, kaj dum la tago la knabo kaŝis la bovon en mal larĝa krutejo, ŝtopante la elirejon per dornarboj. Poste li kutimis peti manĝaĵon ĉe iu proksima bieneto, elpensante ĉiam pli ruze iun rakonton, kiu klarigus lian ĉeeston. Tiam li reiris kaj, havante en la oreloj la sonon de la kontente paŝtiĝanta besto, li endormiĝis ĝis la nokto. Dum unu el ĉi tiuj vizitoj li eksciis, ke efektive la junuloj de lia vilaĝo estis rabintaj bovojn de bienisto, kaj la soldatoj traserĉis la regionon; sed la enloĝantoj ne multe maltrankviliĝis, ĉar ili estis bone kaŝintaj siajn bovojn.

Le sekvantan vesperon li estis proksima al la Amatholi-montoj, kaj la vido de la granda, arbarkovrita montaro tentis lin al frua ekiro. Li estis je malpli ol lancĵeto de la plej proksimaj randarbetoj, kiam li aŭdis tinton de jungaĵo kaj vidis elveni el la ombro kvin ruĝe vestitajn virojn, kaj malantaŭ ili alian en nigra vesto kun larĝgranda ĉapelo. Ili kriegis al li, ke li haltu, sed li ne komprenis kaj freneze batadis la bovon, por ke ĝi ekiro en la alia direkto. Kuglo fajfis super lia kapo, alia ŝprucigis la polvon antaŭ li, alia tuŝvundis la ŝutro de la bovo. Furiozita de la bruoj, la doloro, kaj la nekutima batado, la besto malaltigis la kapon kaj ĵetis kontraŭ la blankulojn. La soldatoj diskuris, sed la nigre vestita viro, sen flankenmoviĝo, senĝene levis la pafilon kaj pafis. La bovo falis preskaŭ ĉe liaj piedoj kaj kuŝis senmove. La knabo staris momenton ŝtonigita, poste kun krio kuris en la arbetaron.

La serĝento komandanta la patrolistojn turnis sian ĉevalon kaj venis al la bienisto.

„Ĉu unu el la viaj, Van der Vijver?“ li demandis.

„Ne, junulo,“ respondis la alia, sed ĝi estas bona besto kaj ni bezonas viandon.“ Li malsupreniris de la ĉevalo kaj komencis lerte senfeligi la kadavron.

Tiun nokton dum ili sidis ĉirkaŭ la fajro, rostante la viandon, unu el la soldatoj diris: „Kio estas tiu bruoj, serĝento?“

„Kiu bruoj?“

„Kvazaŭ iu plorĝemus.“

La serĝento aŭskultis momenton, kaj poste daŭrigis la dismordadon de la viando.

„Kiel mi povus scii?“ li respondis; „verŝajne unu el tiuj bestetoj, kiuj troviĝas en la arbetaro. Kion vi opinias, Van der Vijver?“

La bienisto skuis la kapon. „Afrika infano“, li diris, kaj daŭrigis la manĝadon.

„Jes, estas tiu knabeto!“ diris la soldato.

„Kiu knabeto?“

„La knabeto kun la bovo.“

La soldatoj aŭskultis la malfortan plorĝemadon aŭdeblan tra la mallumo. „Malfeliĉuleto!“ diris unu el ili; „sendube li malsatas. Vilĉjo, ĵetu al li pecon da viando!“

Tradukis D. B. Gregor, kun la afabla permeso de la aŭtoro kaj de la redaktoro de la sudafrika instruista gazeto, *Mentor*.

1) *Venu, mia bovo, venu! Rapidu! (La lingvo estas la zulu'a).*

2) *Ofta virnomo, signifanta „fringo“.*

3) *Knabina nomo, signifanta „Ni estas seniluziigitaj“, ofte al filinoj donata de gepatroj kiuj deziris filon.*

4) *Avenkaĉo.*

5) *Kazeigita lakto.*

ENKETO PRI LA DENASKAJ ESPERANTISTOJ

En kunlaboro kun la Bulteno Gepatra, f-ino Sirkku Koivu entreprenis enketon pri la esperantistaj infanoj kaj pri ĉiuj denaskaj esperantistoj. La demandiloj estas jam senditaj. Gepatroj, kiuj havas infanojn parolantajn Esperanton, kiel ankaŭ ĉiuj denaskaj esperantistoj, estas petataj helpi per siaj akurataj respondoj al la enketo. Se ili ankoraŭ ne ricevis la demandilon, bonvolu ĝin peti de f-ino Sirkku Koivu, Untamont. 4 D 23, Helsinki-Kä, Finnlando.

La enketo estas oficialigita de CED.

ESPERANTO EN UNESKO-DOKUMENTOJ
KAJ PUBLIKAĴOJ

En „Esperanto”, februaro, 1955, sur p. 67 aperis listo de dokumentoj de UNESKO, kiuj rilatas al la Internacia Lingvo.

Ĉi-sube ni donas liston de aliaj dokumentoj, eldonitaj de UNESKO, kiuj rilatas plene aŭ parte al la Internacia Lingvo. Por faciligi la orientiĝon al la personoj, kiuj deziras ilin trastudi, en la listo estas konservita la originala titolo kaj aldonitaj la koncernaj signoj kaj datoj:

1) *Communications Received from Non-Governmental Organizations*, Statement submitted by the Universal Esperanto Association (Komuniko ricevitaj de Neregistaraj Organizaĵoj, Raporto prezentita de UEA), Dok. 45 EX/13 de la 27-a de oktobro 1956.

2) *Conseil Exécutif, Dix-neuvième séance, New Delhi* (Plenuma Komitato, deknaŭa seanco, New Delhi), Dok. 45 EX/SR. 19 (Prov.) de la 3-a de decembro 1956.

3) *Communication de l'Association universelle d'Esperanto* (Komuniko de UEA), Dok. 45 EX/Décisions (Enhavas la decidon de la Plenuma Komitato rilate la raporton de UEA).

4) *Executive Board, 46a. reunión* (Plenuma Komitato, 46-a kunveno), Dok. 46 EX/SR. 2 (prov.) de la 20-a de decembro 1956 (enhavas sur pp. 20—21 la intervenon de la observanto de UEA Lic. Tibor Sekelj en la kunsido de la Plenuma Komitato).

5) *Rapport du Groupe de Travail sur les sondages d'opinions courantes concernant les pays étrangers* (Raporto de la Laborgrupo pri la sondadoj de kurantaj opinioj koncerne la fremdajn

landojn), Dok. UNESCO/SS/17 de la 9-a de novembro 1956.

6) Aro da dokumentoj koncerne la kunvenojn de Neregistaraj Organizaĵoj, en konsultaj aranĝoj kun UNESKO, en kunligo kun la agado de la Laborgrupo pri la edukado al internaciaj kompreniĝo kaj kunlaborado, ekzemple la protokolo pri la kunvenoj de la 6-a kaj 7-a de septembro 1955, la protokolo de la konferenco okazinta la 23-an de aprilo 1956, la protokolo de la kunveno de la 3-a de oktobro 1956, la invito de la 9-a de novembro 1956, la invito de la 9-a de januaro 1957, la laborplano de la 23-a de januaro 1957, la protokolo de la kunveno de la 6-a de februaro 1957.

En diversaj publikaĵoj de UNESKO Esperanto estas sufiĉe ofte menciata. Tiel, ekzemple, la revuo *Courier*, majo 1956, presigis informon pri la publikigo de la bulteno „UNESKO-Novaĵoj” en Esperanto. La sama grava revuo publikigis en la februara numero 1957 mallongan informon pri la verkoj de Shakespeare en Esperanto. La bulteno „UNESCO-Features”, kiu estas sendata al miloj da gazetoj tra la mondo, plurfoje publikigis informojn en kunligo kun Esperanto, ekzemple pri la eldonado de *Medicina Revuo en Esperanto*, pri la Rezolucio de la svedaj esperantistoj per kiu ili esprimis sian solidarecon kun la kampanjo kontraŭ antaŭjuĝoj. Ankaŭ la *Monata Bulteno pri Scienca Dokumentado kaj Terminologio* (Monthly Bulletin on Scientific Documentation and Terminology) alportis kelkfoje tekstojn en Esperanto.

APO, kiu fariĝis AMO

t.e., Agado en Malproksima Oriento

Ĉinujo


Neniam mi pensis, ke la fakto ke mi helpas kiel interpretisto en konferenco de surdmutuloj povas havi kiel sekvon inviton viziti Ĉinujon, por daŭrigi la interpretadon. Tamen, tiel okazis, kaj mi devis sekvi la sorton.

La 1-an de januaro ĉijare mi ekflugis el New Delhi. Tie mi lasis f-inon Parson ekgvidontan la unuan Esperanto-kurson, kiun mi aranĝis per du prelegoj.

Post la varma Kalkuta kaj tropika Bangkok, en Siamo, ni komencis vetkuri kun la tempo, ĝis fine ni atingis la neĝan vintron en Peking. Survoje ni pasigis du tagojn en la kolorplena Hongkong, poste de Kanton ĝis Hankow fervoje zigzagis tra senfinaj rizkampoj. Mi lernis manĝi per bastonetoj, kaj aprezi la dolĉ-acidan porkaĵon, bambusburĝonojn, marplantojn kaj anasovon, kiu anstataŭ kuirado ses monatojn staras meze de argila bulo. Ankaŭ mi lernis, ke la blua pantalono kaj bluzo portata de la plejparto da viroj kaj virinoj estas la bezonata minimuma vivnivelo, al kiu jam alvenis la ĉina popolo. Ankaŭ la minaco de amasmalsato estas for.

Dum dutaga navigado sur la rivero Jangce aŭtuna pluvo nin akompanis ĝis la antikva ĉefurbo Nanking. Ni vizitis la ĉiam interesan havenon Ŝanhaj, kaj de tie flugis al la ĉefurbo, Peking.

Fine en tiu ĉi lasta mi sukcesis kontakti esperantistojn. Dum la unua renkontiĝo vizitis min Ĉang Ĉi-ĉeng, sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj komitatano Ĉen Juan, ambaŭ



Sekelj kaj Ĉen sur la „Longa Muro”. En sia historio la Longa Muro verŝajne la unuan fojon aŭdis paroli Esperanton.

partoprenintoj en la Kopenhaga kongreso. La sekvantan tagon Ĉen Juan akompanis min dum tuttaga ekskurso al la Granda Murego, kiun ni kune admiris. Du tagojn poste la Ligo organizis por mi adiaŭan vespermanĝon, kun la ĉeesto de ok samideanoj, ĉiuj malnovaj, harditaj esperantistoj. Bedaŭrinde, por organizi viziton al oficialaj instancoj la tempo estis tro mallonga, kaj mi sukcesis nur havi neoficialan interparolon pri Esperanto kun la ĉefo de la Oficejo por Kulturaj rilatoj kun eksterlando.

La vespermanĝo transformiĝis en organizan kunvenon. Mi eksciis, ke la sola grupo nun ekzistanta en la lando estas tiu de Peking, kun 20 membroj. Ni preparolis la eblecon reldoni la revuon „El Popola Ĉinio”, eldoni lernolibron, fari informajn prelegojn kaj starigi kursojn. Koncerne ĉiujn ĉi punktojn mi ricevis neformalajn promesojn, kaj mi estas certa, ke la Movado en Ĉinujo komencos sian renaskiĝon dum tiu ĉi jaro. Gravaj faktoroj estis letero de d-ro Lapenna, kiun mi ricevis

la saman tagon de la vespermanĝo, kun ĝisdataj informoj pri la progreso de la Movado en diversaj landoj, samkiel mia informo pri aktivecoj en Unesko-konferenco. Ambaŭ tre kuraĝige efikis.

Krom kelkaj modernaj fabrikejoj mi havis okazon viziti historiajn monumentojn, kiel la Imperiestra palaco, Ĉiela templo, tombo de la dinastio Ming, kaj kun la okuloj plenaj je neforgeseblaj impresoj, la 30-an de januaro forlasis Pekingon. La saman vesperon en Kunming, suda Ĉinujo, mi festis la ĉinan novan jaron dancante kun tibetaninoj kaj ĉinoj, kaj sekvantan tagon alteriĝis en

Birmo

En Rangun mi restis plurajn tagojn, dum kiuj mi lernis ke la uzo de jupo flanke de viroj kaj virinoj egale, tute ne ŝanĝas iliajn karakterojn. Mi ankaŭ admiris la orumitan „Ŝvedagon-pagodon”.

Bedaŭrinde mia amiko la edukisto d-ro Gwan Leong, kiu simpatias kun Esperanto, forestis. Tial mi vizitis la Direktoron de Edukado kaj la Direktoron de Kulturo. La sinteno de ambaŭ kvankam ne tute negativa, estis iom rigida, kaj ne helpis al entrepreno de plua aktiveco. La

agado ĉi tie estos malfacila, kaj necesas pli da tempo kaj favora momento.

En Birmo alvenis en mian manon bulteno de la novaĵ-agentejo Hsinhua, kun interesa novaĵo, kiun mi transkribas. Temas pri

Norda Vietnamo

Hanoi, Jan. 29. — Antaŭ nelonge fondiĝis la Vietnam Pacifista Esperanto-Asocio en Hanoi, laŭ la anonco de lokaj gazetoj. Ĝi estas membro de la Monda Esperanto-Movado por la Paco, kaj de la Vietnam Pac-Komitato.

Inter la 17 membroj de la provizora landa komitato de la Asocio troviĝas Hoang Minh Giam, Ministro de Kulturo; Nguyen Van Huyen, Ministro de Edukado, kaj Duong Bach Mai, Vicprezidanto de la Asocio por Sovet-Vietnama amikeco.

Tibor Sekelj

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 28-a de februaro 1957

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	2090	103.67
2.	Svislando	1910	1635	85.60
3.	Nederlando	4894	4180	85.41
4.	Danlando	1910	1545	80.89
5.	Hispanujo	2092	1670	79.82
6.	Francujo	6575	5199	79.07
7.	Belgujo	1952	1539	78.84
8.	Britujo	7351	5753	78.26
9.	Svedujo	6895	5095	73.89
10.	Italujo	3620	2250	62.15
11.	Norvegujo	2113	1180	55.84
12.	Brazilo	6985	3686	52.77

13.	Germanujo	6515	3180	48.81
14.	Finnlando	2687	1105	41.12
15.	Jugoslavio	3563	1275	35.78

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	580	485	83.62
2.	Urugvajo	325	255	78.46
3.	Novzelando	942	730	77.49
4.	Sudafriko	230	170	73.91
5.	Izraelo	290	210	72.41
6.	Kanado	500	350	70
7.	Aŭstralio	1025	668	65.17
8.	Japanujo	1210	730	60.33
9.	Islando	405	155	38.27
10.	Maroko	1061	340	32.04
11.	Aŭstrujo	1000	10	1

Gabriela Mistral

Elstara figuro en la hispanamerika poezio

La 10an de januaro ĉi-jare mortis pro kancero en novjorka hospitalo unu el la plej grandaj hispanamerikaj poetoj, la ĉila Nobel-premiitino Gabriela Mistral*). Kune kun Alfonsina Storni (Argentino) kaj Juana de Ibarbouro (Urugvajo) ŝi formis trion el plej gravaj literaturaj valoroj en Hispanameriko, kaj certe ŝiaj

versoj samkiel ŝia nomo famiĝis en ĉiuj amerikaj landoj: eldonoj de ŝiaj verkoj estas diversloke aperintaj kaj pluraj sud-amerikaj lernejoj portas ŝian nomon.



*) G. Mistral (pseŭd. de Lucila Godoy Alcayaga) n. la 7. apr. 1889 en Vicuña, vilaĝeto en norda Ĉilio. En 1914 ŝi gajnis unuafoje poezian konkurson per siaj „Sonetoj pri la Morto”. Profesie instruistino, ekde 1922 ŝi loĝadis ekster Ĉilio, kunlaborante en la meksika eduka reformo kaj poste deĵorante kiel konsulo ĉilia en diversaj amerikaj kaj eŭropaj landoj. Nobel-premion en literaturo ŝi atingis en 1945, kaj en 1951 Ĉilio donis al ŝi la nacian literaturan premion. Verkaro: „Desolación” (Nekonsoleblo, 1922); „Ternura” (Milda amo, 1924); „Tala” (Arbhakado, 1938, kies enspezoj estis destinitaj al la hispanaj geinfanoj ĉiuloken forpelitaj okaze de tiea milito); „Lagar” (Vinkelo, 1955) kaj „Poema de Chile” (Poemo pri Ĉilio, 1955). Honortitole ŝi estis Doktoro ĉe diversaj eŭropaj kaj amerikaj universitatoj.

Kian signifon havas la verkaro de Gabriela Mistral en la ĉila literaturo? Rimarkinda trajto de ŝia stilo estas la preskaŭ vira forto de ŝiaj versoj, de ŝiaj,

ankaŭ prozaj, poemoj, kaj neniu tamen povos nei la formon vere karesman en kiu ŝi esprimis temojn pure virinajn, nome patrinecon kaj infanzorgadon. Kaj eble ĉi tie kuŝas ŝia neimitebla originaleco, en la trafa kuniĝo de forte kuraĝaj krioj kaj mildaj, meditemaj susuroj „al izola infano” aŭ „al la plej malgaja patrino”. Kaj certe tio estas aparta valoro ne nur en la amerika sed ankaŭ en la tuta hispanlingva poezio. Enkadrigemo de literatursciencistoj trovas ĉe G. Mistral malfacilan taskon, ĉar, komence influita far la modernista skolo kies hispanlingva ĉefo iĝis nikaragvano Rubén Darío, ŝi iompostiome liberiĝis ĝis atingi tiun rimarkindan literaturan personecon kiu forfuĝas ĉian klasifikon.

Ŝia verkaro povas esti dividita en du grandaj partoj, laŭ la natura divido iam farita de G. Mistral mem, sed kompreneble tiu divido ne tro precize akordiĝas kun fiksjaroj. Unue oni devas lokigi tiujn poemojn kie amo kaj doloro estas la ĉefaj motivoj (amo kaj doloro, ĉar ŝia persona tragedio enhavis ambaŭ: en 1909 ŝia fianĉo, ŝia unua kaj lasta amo, sin mortigis); tiuj poemoj formas plejparte la kolekton „Desolación”. Je la fino de ĉi tiu libro ŝi skribis ke en ĝi restis ŝia dolorplena pasintaĵo „kvazaŭ ombra terfendaĵo” kaj ke de tiam ŝi deziras kanti nur la „vortojn de la espero por konsoli la homojn.” Al ĉi tiu dua ciklo apartenas la postaj kolektoj „Ternura”, „Tala”, „Lagar” kaj „Poema de Chile”, kaj la diversaj porinfanaj poemoj, danckantoj kaj himnoj kiujn ŝi verkis en

Gabriela Mistral:

La Peto

Sinjur', vi scias, kiel mi radiante vervon,
celadas pri fremduloj vin vekoj al kortuŝo.
Mi venas nun por peti por propra kara servon,
por mia vaz' de freŝo, miel' de mia buŝo.

Kalko de miaj ostoj, motivo fundamenta,
trilo de mia aŭdo, de miaj vestoj zono.
Mi zorgas eĉ pri tiuj por mi indiferentaj;
la brovojn ne kuntiru pro nuna petpropono.

Mi diras, ke li estis bona je ĉiu ago;
ĝuste sub haŭttavolo lojala koro nestas
afabla, kaj sincera, kiel la lum' de tago,
graveda de miraklo, kiel printempo estas.

Respondas vi severe, ke kiu eĉ ne ŝmiris
la lipojn per preĝado ne donas preĝokazon,
kaj li, ne atendinte signon de vi, foriris
tempiojn frakasante, kiel fragilan vazon.

Sed mi, Sinjur', konvinkis al vi, ke lian koron
dolĉan kaj turmentatan karesis tuŝo mia
de sama maniero kiel la fruntmarmoron;
kaj tenis ĝi silkecon de florkalik' embria.

Li estis do kruela? Memoru: li konjektis
ke l' propra sino putras, kaj sekve mem ĉagrenas,
kaj miajn ĝojofontojn por ĉiam li difektis.
Ne gravas, mi lin amis, lin amis! Vi komprenas.

Kaj ami (vi ja scias) estas penad' amara:
reteno de palpebroj pro larmvual' malsekaj,
perkisa remildigo post pentĉemizo hara,
kaj konservante tamen okulojn ekstazegaj.

Havas bongustan freŝon la fero, kiu boras,
kiam ĝi karnon tranĉas, kvazaŭ la grenan garbon
(ho Reĝo de la judoj, pri tio vi memoras)
kvazaŭ rozaron oni surportas la krucarbon.

Dum mi babilas al vi, Sinjoro, kun vizaĝo
falinta sur la polvon, krepusko sin etendas,
eĉ ĉiuj la krepuskoj de l' viv', ĝis maljunaĝo,
se vi rifuzos vorton, kiun mi nun atendas.

Mi lekos viajn vestojn, kiel pudel' timema,
lacigos mi per preĝoj kaj ploroj vian aŭdon,
eviti min ne povos via okul' plena,
nek la piedo mian torentan larmoplaŭdon.

Donu pardonon fine. Ĉe l' vorto sin dissemos
parfum' de cent ŝprucantaj flakonoj de odoroj,
kaj ĉiu akvo lustre de briloj radiemos,
dezert' produktos belajn; ŝtonejon garnos floroj.

Malsekos la okuloj malhelaj de l' rabbestoj;
la mont' konscios, kvankam vi forĝis ĝin el ŝtono,
kaj ploros tra l' palpebroj blankaj de l' glacirestoj;
kaj tuta via tero ekscios pri l' pardono.

El la hispana: Amalia Núñez Dubús

1915—16 kaj aperintaj sur la legolibroj de ŝia kolego Manuel Guzmán Maturana. Ni rapide trarigardu kelkajn temojn de ĉi tiu ciklo: lulkantoj, dancrondaj poemoj, lernejoj, sudamerikaj pejzaĝoj, precipe ĉilaj, kaj diversaj aktivecoj de la homa vivo. Kiel dirite, signifoplenan gravecon havas en ŝia verkaro la pentrado de patrineco kaj infanaĝo; al tio ni devas aldoni ke, ĉar ŝi estis instruistino, al la lernejoj — tiuj simplaj, malriĉaj ĉilaj kamparaj lernejoj — kaj ties instruistinoj, ŝi dediĉis la plej amemajn esprimojn de sia koro. Kontraŭe al la plej nombraj el la nunaj poeziaj tendencoj en Ĉilio, G. Mistral serĉis ankaŭ sian inspiron en la religiaj tradicioj kaj tre speciale en la Biblio; animo profunde religia, ŝi verŝis en siajn versojn amon al Kristo kaj al la ĉefaj kristanaj misteroj, kaj klopodis konigi tiun amon ankaŭ al la amataj infanoj.

Aliaj gravaj poetoj de Ĉilio estas Vicente Huidobro (ankaŭ mortinta kaj iniciatinto de superrealismaj tendencoj), Juvencio Valle kaj Pablo Neruda (literatura Stalin-premio, fervora komunisto, kies poemoj estas tradukitaj en plurajn diverslandajn lingvojn). Apud ili staras G. Mistral, nek kun nek kontraŭ ili, sed apud. Kaj per tio ni volas diri ke ŝi restis ekster skolaj luktoj, kio fakte malpliigis ŝian literaturan influon, ĉar verdire ĉi tiu ne estas tiel granda, kiel ekz-e tiu de Neruda. Sed pli ol ĉiuj ĉilaj verkistoj, ŝi sukcesis pli vastan kaj puran popularecon, kaj ŝiaj poemoj fariĝis la amzorgita kaj neforlasebla posedaĵo de tuta popolo kiu amis ŝin. Kaj jen kio gravas: G. Mistral estis por la ĉilaj popoltavoloj, speciale por la plej humilaj, pli ol poeto, pli ol verkistino fama: ŝi estis Ĉilio per la voĉo de infanoj kaj patrinoj, de vulkanoj kaj montaroj, de lernejoj kaj sublunaj somernoktaj rondodancoj.

La laco kiun ŝi iam prikantis venis sur ŝin kaj ŝi revenis al Dio kiu kreis ŝin.

Kaj nun miajn palpebrojn fermu, Kristo, froston sur buŝon metu,
ĉar estas superfluaĵ ĉiuj horoj
kaj estas jam diritaj ĉiuj vortoj...
Ricevu min, mi iras plena,
tiel plena kiel ter' inundita.

(El „Desolación”)

Nia Konkursoj

Literatura Vetludo N-ro 4

Imagu, ke grava filmkompanio entreprenis tutesperantan filmon, kaj ke vi ĉeestis kiel kritikisto la premieron (la debutan prezentadon). Verku recenzon el maksimume 250 vortoj. Provoj atingu la redakcion ĝis la 30-a de majo. La plej bonaj aŭ amuzaj ricevos libro-premion kun enskribo. Konkursantoj povas uzi pseŭdonimon (sed aldonu la ĝustan nomon kaj la adreson).

John Varty



Parizo — celo de la Oficiala Antaŭkongreso de la 42a U.K.
Ĝardeno de la Karuselo.

„Voĉpondu!”

Anstataŭ resti kontenta per leterinterŝanĝado, vi povas — se vi posedas aŭ povas pruntuzi magnetofonon — ja paroli rekte al samideanoj en la tuta mondo. Kaj la perilo de tiuj koniĝoj povas esti la „Voicepondence Club” (Voĉ-korespond-klubo).

Tiu klubo estas nekomerca organizo de personoj, kiuj posedas magnetofonojn. Ili loĝas en 44 usonaj provincoj kaj 24 aliaj landoj. La membroj interŝanĝas sonbend-„leterojn” pri siaj hejmoj, familioj, teknikaj aferoj, muziko, arto, kaj miloj da aliaj aferoj, kiuj interesigas konversacion. Ne ekzistas baroj kontraŭ raso, kredo, koloro, aĝo, politiko, nek lingvo.

La sekretario de la klubo nun studas nian lingvon kaj sincere simpatias al nia movado. Estas esperantistoj inter la membraro de la klubo, kvankam ne tiom, kiom oni esperas havi kiel eble plej baldaŭ!

Nova membro ricevas la klubanan adresaron, kiu diras pri la okupo, intereso, ktp., de la membroj. Traleginte la adresaron, oni povas skribi al tiuj membroj kies intereso similas al la oniaj. Oni sendas leteron manskribitan por peti korespondadon per sonbendoj. Post konsenta respondo la nova membro sendu sonbendon al sia nova „voĉpondanto”, parolante pri si mem, intereso, loĝejo, laboro, ktp. La sama sonbendo estas uzata refoje post refoje, ĉar la magnetofono „forfrotas” la malnovan mesaĝon dum la surbendigo de la nova mesaĝo.

Se vi volas interŝanĝi sonbendojn, skribu leteron al la sekretario de la Voicepondence Club, s-ro Charles Owen Jr., NOEL, Virginio, Usono. Li sendos al vi senkostajn informojn.

Conrad Fisher.

Internacia Lingva Humoro

Sinjoro Guide Book nekonata. — El Londono alvenis en grandan urbon de Okcidenta Germanujo letereto, adresita al „Informationsbüro” (Inform-oficejo), datumita la 27-an de oktobro, kun jena enhavo en la angla lingvo: „Dear Sir, I shall be glad if you would kindly send me a Guide Book and street map of your town. Yours faithfully J. B. Sanders.” (Kara sinjoro, mi estus dankema se vi havus la afablecon sendi al mi Gvidlibron kaj mapon de stratoj de via urbo. Sincere via J. B. Sanders.) La poŝtisto portis la leteron al la policejo, opiniante ke ĝi ja estas plej bone „informita”. De tie la letero estis sendita al la centra registra oficejo, kie la nomoj kaj adresoj de ĉiuj enloĝantoj estas registritaj. De tie la letero revenis al la ĉefa poŝta oficejo kun la mencio: „Sinjoro Guide Book ne anoncita ĉi tie. Iu Gerhard Book, naskita la 1-an de majo 1910 en Wiesenstadt, estas, reveninte el angla kaptiteco, anoncita, ek de la 2-a de julio 1948, en Seedorferstr. 18, ĉe Schwennike. Dept. VI. MB4, ĉefsekretario Müller.” Jen trafa ekzemplo — unu el la multaj — pri la „ĝenerala kono” de la angla lingvo en la mondo!

Ni ne estas fremduloj. — En tagjurnalo de Birmingham s-ro W. A. Chittenden, Wormholt Estate, W 12 skribis jenon: „En Hook van Holland ni rimarkis anoncon 'Fremduloj devas deklari siajn nederlandajn guldenojn ĉi-tie'. Ni staris flanke por lasi la fremdulojn preterpasi. Daŭris sufiĉe longe ĝis ni komprenis, ke la anonco koncernas nin.” (!!)

Atentigo de la redakcio: Ni volonte publikigos similajn verajn okazaĵojn, kiuj montras ridindajn situaciojn pro lingva nekomprene aŭ miskompreno, kiel ankaŭ pro naciisma sprito, kiu kaŭzas alian specon de ridindaj miskomprenoj.

Tra la Romaj postsignoj en Provenco

Grandaj festoj signis pasintjare la duan jarmilon de la provenca civito Arles: efektive, en la mezo de la unua jarcento antaŭ Jesuo Kristo, leŭtenanto de Cezaro instalis kolonion de veteranoj de la sesa legio kaj ŝipkonstruejon. Arles, aŭ pli ekzakte la romia kolonio „Colonia Julia Paterna Arelate Sextanorum” estis fondita. Tiu datreveno donas la okazon memorigi, ke Provenco posedas la plej belajn romiajn restaĵojn en Francujo: tie sub ĉielo eterne blua, la turistoj amantaj malnovajn ŝtonojn povas admiradi la prestiĝajn postsignojn de la romia genio kaj revii malrapide, lulataj de la cikadkanto.

En **Arles**, jen la amfiteatro, unu el la plej belaj de la romia mondo, datumanta de la unua jarcento de la kristana erao: dudeksesmil rigardantoj povis samtempe troviĝi tie kaj aplaŭdi la gladiatorojn, la ĉasadojn kaj batalojn de sovaĝaj bestoj. Rigardu atente ĝiajn ŝtupojn: tie vi povos vidi la surskribojn montrantaj la rezervitajn lokojn por la membroj de korporacioj aŭ apartaj grupoj. Ĉiu socia klaso havis sian difinitan lokon en la amfiteatro: sur la unuaj ŝtupoj la ekipĉefoj kaj la estroj de la civito, pli alte la kavaliroj, la korporacioj kaj la civitanoj, fine, sur la lastaj ŝtupoj, la malsupraj klasoj.

La Teatro de Arles, el kiu restas ankoraŭ gravaj fragmentoj, estis, bedaŭrinde, detruita en la V-a jarcento kaj poste utiligata kiel ŝtonejo por konstrui la preĝejon „Saint Trophime” kaj aliajn religiajn konstruaĵojn. Ĝi povis ricevi dekdu mil spektatorojn. Apude troviĝas la „Caldarium”, ĉambro rezervita kiel ŝvitbanejo kaj por varmaj banoj, sola restaĵo de la antikvaj termoj. En la pagana ŝtonmuzeo oni povas admiri unu el la plej riĉaj kaj variaj kolektoj de skulptaĵoj: belaj marmoraĵoj, kiuj ornamis la teatron, altaroj kaj religiaj monumentoj, paganaj kaj kristanaj sarkofagoj, vazoj, statuetoj, k.t.p.

Je dudeko da kilometroj nordoriente de Arles, je malsupro de Alpilles, en admirinda pejzaĝo, kiu superrigardas la ebenaĵojn de Rodano kaj Duranco, staras du monumentoj juste famaj, kiuj signas la lokon de antikva Glanum, nun **Saint-Rémy-de-Provence**. Unu estas triumfarko kun unu sola aper-turo, ĉirkaŭita de masivaj plenaĵoj je implikitaj kolonoj, el kiuj du grupoj de kaptitoj ornamas la ĉefajn flankojn; la alia estas maŭzoleo starigita memore al la nepoj de imperiestro Aŭgusto: Caius kaj Lucius. Je tricentmetra distanco de tiuj antikvaj artaĵoj, la elfosadoj en Glanum malkaŝis la ekziston de du belaj grekaj loĝejoj, solaj grekaj postsignoj, kiujn posedas Francujo kun tiuj malkovritaj en Istres.

Kvardeko da kilometroj malproksimigas Saint-Rémy de **Orange** malnova kolonio de veteranoj fondita de Cezaro por protekti la vojon de Arles al Lyon. En Orange staras la plej bela triumfarko, kiun posedas Francujo, konstruita en la periodo mem de la kreo de la civito kaj kiu, dank'al sia admirinda friso de kunbatalantoj povas esti komparata al la triumfarkoj en Romo. En Orange troviĝas ankaŭ la teatro plej kompleta kaj plej bone konservita el la romiaj teatroj; la sola en la mondo, kiu plene konservis sian trideksesmetran fasadon laŭ tricentmetra larĝo eksterordinare impona. Kolosa statuo de Aŭgusto retrovita dispecigita estis riparita kaj relokigita sur la loko mem, kiun ĝi okupis antaŭ dumil jaroj.

Vaison estis unu el la plej rimarkindaj urboj el Narbona „Gallando”. Tie naskiĝis kelkaj granduloj: Burrus, la gubernisto de Nerono, la historiisto Trogue-Pompée kaj Duvius Avitus, konsulo kaj guberniestro de Germanujo. Vaison konservis de tiu brila epoko ponton super l'Ouvèze, sian teatron, parton de la akvoponto de Groseau, kloakojn, termojn kaj precipe restaĵojn de domoj, familiaj kaj kortuŝaj, kiel tiuj de la domo de la „Messi” familio, riĉaj privataj apartamentoj grupigitaj ĉirkaŭ granda peristilo... Koncerne la muzeon de Vaison, ĝi entenas gravan kolekton de statuoj de dioj, imperiestroj kaj estroj de la civito.

Jen nun la brilaj artaĵoj de **Nîmes** la „franca Romo”, naskiĝloko de la familio de la imperiestro Antonino, kie estas konservataj la tri plej belaj romiaj monumentoj de Provenco.

Unue jen la fama amfiteatro, kie ankoraŭ nun okazas la virbovbataloj. Ĝi estis konstruita dum la unua jarcento de la kristana erao: iom pli malgranda ol tiu de Arles, ĝi restis multe pli kompleta, precipe koncerne la kronadon de la supra etaĝo, kie oni ankoraŭ vidas la truitajn subportilojn kiuj subtenis la grandegan tolajon pendanta de la supro de la konstruaĵo por ŝirmi la rigardantojn de la sunradioj. La amfiteatro estis rezervata por batalo: homoj kontraŭ homoj aŭ homoj kontraŭ bestoj. La muzeo de Nîmes konservas, kortuŝa detalo, la epitafojn de gladiatoroj, kiuj famiĝis en tiuj sangelverŝaj bataloj: Ursio dekkvar fojojn venkinta, Pompeius naŭ fojojn venkinta... La ekzisto de volbohava akvoponto kondukanta sub la areno ebligas pensi, ke ĉi-tie okazis ankaŭ spektakloj sur akvo.

Dua el la grandaj antikvaj restaĵoj de Nîmes la „Maison Carrée” (la kvadrata domo) estas la plej fama el la romiaj monumentoj en Francujo pro la harmonio de siaj proporcioj kaj ankaŭ pro la eleganteco kaj delikateco de realigo de siaj malsamaj elementoj. Admirinde konservata, tiu templo, datumanta de la jaro 20 antaŭ Kristo, prezentas portikon subtenatan en kies muroj estas implikitaj dudek aliaj kolonoj de sama stilo.

Tria mirindaĵo de Nîmes „Le Point du Gard” transiras la valon de Gard en bela sovaĝaspekta pejzaĝo post Remoulins. Per siaj ducent sesdeknaŭ metroj de longeco je la supra etaĝo kiu surportas la kanalon kondukantan al Nîmes la akvojn de la fonto Eure apud Uzès, kaj siaj kvardek metroj da alteco, la „Pont du Gard” restas la plej belega pruvo de la romia arkitektura genio en Provenco.

Aliaj provencaj belegaj montriĝas al nia admiro: la Templo de Aŭgusto kaj Livio en **Vienne**, la Turo de Aŭgusto en **Fréjus** kaj ĝia baptokapelo, la kolonaro de **Riez**, la Ponto Flavien en Saint-Chamas kaj ankaŭ multaj aliaj.

La antikvaj romiaj temploj lasis sur la tero de Francujo en la „Provincia Romana” de Cezaro monumentojn pli belajn kaj pli nombrajn ol en iu ajn alia lando.

Pierre Bourget
el la franca tradukis: **Paul Saretto**



„Nu estonte, kiam vi fermos pordon, ekrigardu flanken!”



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

Nia februara semajnfino malfermiĝis la 16-an per gvidita vizitado al la Urba Biblioteko de Berno. Amikino de nia movado laboras en tiu biblioteko kiel fotistino. Ŝi gvidis nin tra ĉiuj sekcioj de tiu domo, de la manuskripta muzeo al la klasigmaŝino, kiu permesas per racia artifiko klasigi en difinita loko kvarfoje pli da libroj ol antaŭe.

Post gaja tagmanĝo ĉe la Junulargastejo sorĉisto prezentis varietean programon; kantoj kaj ludoj agrabligis tiun neforgeseblan vesperon.

Dimanĉe okazis vizito al la Svisa Parlamentejo. Antaŭ la tagmanĝo ni admiris el la supro de la katedrala turo la urbon kaj la belan sunon kiu briligis la Alpojn. Grandioza panoramo.

Ni denove manĝis ĉe la Junulargastejo kaj posttagmeze ni promenadis laŭlonge de la Arrivero kaj en la Bestarbaro.

Bela semajnfino kiu grupigis bonan nombron da junuloj.

* Nia sekcio progresas konstante kaj niaj monataj renkontiĝoj estas plenaj de varbeblecoj.

Ni fondis en la komenco de la jaro rondon de „Amikoj de la Esperanto-Junularo”. Al ĝi aliĝis jam multaj samideanoj de nia lando. Nuntempe ni fondas rondon de subtenantoj neesperantistaj. En la franca regiono de nia lando tiuj subtenantoj nomiĝas „Les Amis de l'Espéranto” kaj en la germana „Die Freunde des Esperanto”. Ili pagas minimuman jarkotizon de 12.— fr. dum la amikoj de la junularo pagas nur 5.— fr.

Niaj kotizoj varias laŭaĝe: ĝis la 16-a jaro membro pagas nur 3.— fr., ĝis la 20-a jaro 5.— fr., kaj ĝis la 30-a jaro (aĝlimo por nia movado) 7.— fr. Duono de tiuj kotizoj estas por Svisa Esperanto-Societo kaj la alia duono por ni.

Tiuj kotizoj kaj la kotizoj de niaj amikoj kaj subtenantoj permesas al ni labori sendeficite kaj propagandi sufiĉe multe.

Nuntempe okazas varbkonkurso. Ĉiu membro, kiu varbos dum tiu ĉi jaro du novajn membrojn aŭ subtenantojn ne pagos la kotizon 1958. Ĉiu membro kiu varbos pli ol du personojn rajtos partopreni al premia konkurso.

Ni ĉiam esperas, ke la junuloj trapasantaj nian landon ne forgesos informiĝi ĉe Esperanto-Junularo, Crêt 78, **La Sagne** (Neuchâtel) pri niaj manifestacioj.

Klaŭdio Gacond,
prezidanto de EJS.

ESPERANTO-SOCIETO ĈE EKSTERLAND-INSTITUTO DORTMUND

La junaj Esperantistoj de Dortmund ricevis komence de la pasinta jaro la grandan ŝancon, fondi propran societon en la kadro de la Eksterland-Instituto Dortmund. Nia „Esperanto-Societo” reprezentas la 12-an lingvon instruatan en la Instituto.

Danke al la pozitiva subteno kaj ĉiam vere nobla varbmaniero de la gelernantoj dum la daŭraj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj ĉiam pluraj interesuloj demandis pri novaj kursoj. Kaj ĉiuj kursoj bone sukcesis.

Dum la pasintaj 19 monatoj la „Esperanto-Societo” senpaŭze laboris por la Esperantista afero, aranĝis publikajn varbvesperojn, havis ĉ. 100 regulajn kunvenojn, festis memortagojn, faris ekskursojn, invitis eksterlandajn Esperantistojn. Pluraj gesocietanoj partoprenis la diversajn regionajn kaj landajn renkontojn, la 40-an kaj la 41-an Universalajn Kongresojn de Esperanto en Bolonjo kaj Kopenhago, la Internacian Ferio-Semajnon en Konstanz/Bodensee kaj la Internacian Junular-Kunvenon en Büsum. Dum la ĉijara „Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Tago en Essen”, sabaton/dimanĉon la 22/23-an de septembro 1956-a, la Esperanto-Societo Eksterland-Instituto Dortmund, kiel la plej juna Esperanto-grupo en la distrikto gajnis en la lingva konkurso la „Migrantan Premion de REVELO”. Preskaŭ ĉiuj membroj havas iun korespondadon kun eksterlandaj geamikoj.

Ĉe la komenco de novembro la urbo Dortmund inaŭguris la novan kultur- kaj junular-centron, la „Fritz-Henssler-Domo”. En tiu triparta, granda, moderna konstruaĵkomplekso troviĝas la „domo por la junularo”, la „popolaltlernejo” kaj la „eksterlandinstituto”. Ni intencas iomete pli poste detale raporti pri ĉiuj interesaroj rilatantaj tiun centron de komuna laboro por la junularo kaj la tuta enloĝantaro de nia urbo. Hodiaŭ ni nur volas diri, ke ni, la Esperantistaro de la Eksterland-Instituto kun la membroj de la ceteraj 11 lingvaj sekcioj en la Instituto vere estas fieraj, ke nun estas je nia dispono tiaj vere belegaj instru- kaj laborĉambroj kaj precipe granda luksa klubsalono por ĉirkaŭ 60-70 personoj. Nun ni volas streĉi ĉiujn niajn fortojn, por movi la propagandotamburon, esperante, ke ni sukcesos baldaŭ mobilizi pli grandan rondon de interesuloj kaj pligrandigi la rondon de niaj membroj.

Hans Rosenträger, prezidanto de Esperanto-Societo Eksterland-Instituto Dortmund.

MALLONGAJ INFORMOJ

* La instancoj de la 6-a Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj de la Studentaro ĉiam pli interesiĝas pri nia lingvo. Ekzemple la Bulgara Festivala Prepara-komitato energie antaŭenpuŝas la aferon, kaj el ĉi tiuj linioj, ĉerpitaj el letero de ĝia prezidanto al la junaj geesperantistoj en Moskvo vi povos taksu la gravecon de la laboro farita sur tiu tereno de niaj junaj bulgaraj gesamideanoj. Jen kiel la bulgara neesperantista instanco skizas la programon:

„En Moskvo devas funkcii aktiva Esperanto-preparfestivala komitato. Ĝi devas esti la stabo de ĉiuj esperanto-aranĝoj dum la festivalo. Ĝia adreso devas esti konstanta kaj oni devas facile trovi ĝin en la tagoj de la festivalo. La stabo devas esti en konstanta ligo kun la Centra Festivala Preparkomitato kaj la redakcio de la gazeto „Festival”. Oni devas pripensi kaj difini la (provizoran) programon de la Esperanto-aranĝoj dum la festivalo.

Grava demando staranta antaŭ ni ĉiuj estas la propagando de Esperanto antaŭ, dum kaj post la festivalo. Ni devas malfermi kursojn, disdoni flugfoliojn, meti sloganojn pri Esperanto dum la festivalaj tagoj, esperantigi la vagonarojn per kiuj veturas festivalanoj al Moskvo ktp.

Estus bone, se gazeto „Festival” organizos enketon „Kiamaniere oni povas eviti la multlingvecon dum la festivalo”. Jen la adreso de la redakcio: Moskva, C, Ĉistje prudi, d.8. **(Rimarko: interesiĝantoj bonvolu uzi ĉi tiun adreson por peti de la redakcio, ke almenaŭ unu numero aperu en Esperanto).** Al la redakcio ni sendas artikolon pri Esperanto aperintan en la sola junulara jurnalo aperanta en Bulgarujo, kiu havas eldonnombron de 180 mil ekz.

Ankaŭ de la Internacia Prepara Komitato venas kuraĝigaj vortoj: en longa letero (franklingva) al TEJO, estas skribite: „La Komitato rimarkas kun ĝojo la intereson montritan de via organizaĵo pri la Festivalo. Ni estas kontentaj sciigi vin, ke nia Komitato ricevis grandan nombron da leteroj de organizaĵoj de junaj esperantistoj el Anglujo, Francujo, Polujo, Germana Federacia Respubliko, ankaŭ interesiĝantaj pri la Festivalo kaj faras proponojn pri la organizo de la Renkontiĝo de la junaj esperantistoj antaŭvidita de la programo de la 6-a Festivalo.

* En Britujo funkcias la „Esperanto Youth Club”, sendependa penado organizi la Esperantistan junularon tie, en bona kunlaboro kun Brita Esperantista Asocio; ĝi kolektas membrojn de 12 ĝis 21 jaroj, eldonas stencilitan anglalingvan bultenon.

* En Germana Demokrata Respubliko funkcias nun kiel peranto Hyeronimus Stroinski, Borsdorf ĉe Leipzig.

* En Italujo ĉiam pliiĝas la junularaj grupoj: aldoniĝas nun la Junulara Esperanta Grupo en Verona kaj la klubo „Galileo Galilei” en Genova.

Tra la manda

• **Via Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendas Esperanton.** Ĉe Asembleo okazinta la 28-29an de januaro, oni akceptis jenan rezolucion: „La Via Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendas al ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj la lernadon de la internacia lingvo Esperanto, pro ĝia granda utilo en la internaciaj interrilatoj”. Plena raporto troviĝos en nia venonta numero.

• **Esperanto en grava lingvistika revuo.** La revuo „Voprosi Jazikoznanija” (Lingvosciencaj Demandoj), eldonata de la Lingvo-sciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de U.S.S.R. publikigis en sia kvara numero, julio-aŭgusto 1956, unupaĝan informon pri la diskuto okazinta en la Sekcio de la ĝenerala kaj kompara-historia lingvoscienco pri la referaĵo de D-ro E. A. Bokarev „Nuntempa Stato de la Demando de Internacia Helpa Lingvo”. En la sesa numero, novembro-decembro 1956, de la sama revuo aperis sur pp 65-78 grava artikolo de O. S. Ahmanova kaj E. A. Bokarev sub la titolo „Internacia Helpa Lingvo kiel Lingvistika Problemo”.

• **Nova gazeto en Jugoslavio.** Ĵus aperis la unua numero de „Jugoslavia Esperantisto”, oficiala organo de JEF. La gazeto estas presita, grandformata, 4-paĝa, kaj aperados regule ĉiumonate. La ĝisnuna organo de JEF, „La Suda Stelo”, plue aperados ĉiun duan monaton kiel kultura, literatura, scienca kaj socia revuo. En sia unua numero **Jugoslavia Esperantisto** interalie skribis: „Manko de financaj rimedoj ligis al ni manojn kaj piedojn; restis libera nur koro, kiu batis por nia afero, kaj kapo, kiu cerbumis pri liberiĝo el financaj katenoj. La firma volo de nia flanko denove montriĝis nevenkebla. Nia obstina persisto... ebligis solvi ankaŭ tiun gravegan kaj malfacilan problemon.” Kuraĝigaj vortoj, kiuj devus inspiri la laboron de ĉiuj, kiuj emas halti antaŭ obstakloj! La gazeto ankaŭ informas, ke la granda loterio organizita de JEF en la tuta lando havigis al la Movado fincan bazon de kelkaj milionoj da dinaroj (pluraj miloj da pundoj)!

• **Argentinaj studentaj esperantistoj festas.** La Studenta Esperanta Centro en Mendoza, Argentino, festis la unuan datrevenon de sia organo „EK!” per speciala numero enhavanta kontribuojn de mondkonataj aŭtoroj Auld, Boulton, Gomes Braga, Matkowski, Rossetti, Saldanha Carreira kaj Thorsen.

• **Vigla eldonagado ĉe KOKO.** Ĉe la koopera eldonejo KOKO de Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago, aperos en majo la 3a verko en la KOKO-serio de plaĉe binditaj kaj ilustritaj verkoj originale en Esperanto. (Pli frue aperis Poul Thorsen: **Rozoj kaj urtikoj** kaj K. Kalocsay: **Ezopa Saĝo**). La tria KOKO-krio signalas originalan novelaron 144-paĝan de la konata norvega aŭtoro Johan

Hammond Rosbach: **Homoj kaj Riveroj** (prezo 12 d.kr.). Antaŭmendu aŭ petu eldonplanon ĉe **KOKO, Randøvej 4, Kopenhago F.**

• **Esperanto devige instruata en Brazilo.** En Instituto Tiradentes, en Fortaleza, Ceará, Brazilo, Esperanto estas devige instruata de la unua ĝis la kvina klaso. En multaj aliaj lernejoj en Brazilo Esperanto estas nedevige instruata.

• **Eminenta katolika libro en Esperanto.** Vere rimarkinda libro estas la „Memorlibro”, kompilita de nia ĉina samideano Pastro J. B. Kao, en Rio de Janeiro. Ĝi estas kolekto da paroladoj, leteroj k.a. dokumentoj redaktitaj en Esperanto de katolikaj esperantistoj el diversaj landoj, pri la 36a Internacia Eŭkartistia Kongreso, efektiviĝinta en Rio de Janeiro, de 17 ĝis 24 de julio 1955. Ĝi estas la unua katolika libro en Esperanto aperinta en Brazilo kun Eklezia aprobo.

dankon! Lastmomente: alvenis ankaŭ ĉeĥa kaj ukraina tradukoj. Esp.-gazetoj, kiuj reprenis la Ĉarton, estas petataj sendi ekzempleron al la supra adreso.

• **Esperanto instruata en Germana Popolrespubliko.** En la „Mittelschule” Radebeul, Harmoniestrasse, la pedagogia konsilantaro metis en la tagordon de kunsido referaton de samideano Ranft pri la demando: „Ĉu infanoj povas lerni Esperanton?” Post klarigoj pri la situacio en la tuta mondo kaj la nun konstatebla plifavora situacio en DDR, la ĉeestantoj unuvoĉe decidis lernigi Esperanton al tiuj infanoj, kiuj tion deziras. Anonciĝis jam 24 infanoj. La pago por la instruanto okazos el ŝtataj monrimedoj. Grave influis la instruistojn la jam ekzistanta korespondo de infanoj kun eksterlandaj infanoj. La korespondo ĝis nun okazis en nacia lingvo kun Esperanta traduko.

• **„Akademiaj Palmoj” al merito-**



Estraranoj de Urugvaja Esperanto-Societo kun la gepartoprenintoj de la programo, okaze de la Zamenhofa Festo kunligita al la Tago de Homaj Rajtoj, kiun UES organizis la 17an de decembro 1956.

• **Formiĝis tutŝtata komitato de la rumana esperantista movado.** La 26an de decembro 1956 okazis en Bukaresti speciala kunveno, kiam formiĝis la tutŝtata komitato de la rumana esperantista movado, sub la nomo: „Iniciata Komitato por Esperanto” de la Rumana Popola Respubliko. La tuja tasko de tiu ĉi komitato estas revigligi kaj reorganizi la rumanan esperantistan movadon. Adreso: Esperanto, Poŝtkesto Nr. 205, Bukaresti, Rumanujo.

• **Nacilingvaj tradukoj per Esperanto.** En la februara numero de „Esperanto”, p. 27, ni presigis „Ĉarton de la Nova Tero”, kun peto, ke oni sendu nacilingvajn tradukojn de tiu teksto al adreso: „Trees and Life”, The Firs, West End, Southampton, Britujo. Ni informiĝis, ke per Esperanto oni jam ricevis tradukojn el Germanujo, Hispanujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Portugalujo kaj Rusujo. Ni insiste petas niajn legantojn en aliaj landoj **sendi tradukon de la teksto al la supra adreso.** Per tio ili ne nur helpas la progreson de Esperanto: ili helpas ankaŭ homon, **kiu mem jam multe helpas la britajn esperantistojn.** Antaŭ-

plena esperantisto. Laŭ freŝa dekreto, la franca ministro pri la Nacia Edukado ĵus ordenis nian amikon Raymond Fiquet, administranton de „La Nica Literatura Revuo”, per la „Akademiaj Palmoj” pro la agada kaj meritinda rolo, kiun li de longe plenumas kiel instruisto pri la lingvo Esperanto en la Politeknika Asocio de Nice. Niajn korajn gratulojn.

• **Nova gazeto por senreligiuloj.** Nova gazeto tute en Esperanto ekaperis en Pelotas, R.G.S., Brazilo, por senreligiuloj, kiel organo de SAT en Sudameriko. Ĝin lerte redaktas samideano G. Ledon, Rua B. Martins 371. La titolo estas „La Objektivito”, sed ĝi tute ne temas pri fotografio. Ĝia celo estas ataki ĉiujn sociajn erarojn el vidpunkto anarkista, en la bona senco de anarkio.

• **Esperanto ĉe Metodistoj.** La Metodista Eklezio en Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo, havas nun en sia bela Templo du kursojn de Esperanto gvidatajn de D-ro Dilermando Teixeira: unu por komencantoj kaj la duan por progresintoj. La informa bulteno de la Eklezio anoncas tiujn kursojn kaj invitas ĝiajn membrojn al lernado. La Pastoro mem



En „La Juna Vivo” (p. 40) ni jam raportis pri la TEJO-Skisemajnoj en Werfenweng. Supre ni vidas (dekstre) parton de la partoprenantoj, kiuj reŝreŝigas survoje al montopinto Hiskogel. (Maldekstre): „Kun kantoj kaj ĝoj’ sen iama lac’” tra la bela vintra naturo.

estas lernanto en la kurso por progresintoj. Imitinda ekzemplo!

- **KELI kongresos en Svislando.** En la nuna jaro la kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazos tuj post la U.K. De la 10a de aŭgusto ĝis la 17a de aŭgusto KELI-anoj, simpatiantoj kaj interesiĝantoj venos al la fama Kastelo Münchenwiler, proksima al la urbeto Murten en la belega okcidenta montparto de Svislando. Informoj kaj aliĝiloj estas akireblaj ĉe: S-ro F. Liechti, Wallisellenstrasse 429, Zürich 50, Svislando.

- **Britaj liberpensulaj esperantistoj organiziĝis.** La 27an de januaro 1957 fondiĝis la Brita Liberpensula Esperantista Asocio. La celoj de la Asocio estas (i) disvastigi la scion pri kaj la lernon de Esperanto en la vicoj de liberpensuloj, humanistoj, racionalistoj, ateistoj kaj similaj personoj en Britujo, kaj (ii) disvastigi la scion kaj komprenon pri la liberpensismo kaj parencaj ismoj inter la esperantistaro laŭ la normalaj ĝentilaj metodoj de la propagando, t.e., sen ofendo al iuj. Sekretario: S-ro G. L. Dickinson, 21 Gribble Road, Liverpool 10.

- **Sekcio de kinomatografiistoj ĉe Bulgara Esperanto-Asocio.** La 16an de januaro 1957 fondiĝis Sekcio de la kinematografiistoj ĉe BEA, kun prezidanto s-ro Georgi Stojanov-Bigor, filmkritikisto. Per Esperanto la bulgaraj kinematografiistoj interŝanĝos artikolojn kaj diversajn informojn pri la problemoj de la nuntempa filmarto. La plej interesaj el ili estos presataj en la fakaj gazetoj kaj revuoj. Oni klopodas per la specialaj institutoj esperantigi kelkajn dokumentajn aŭ sciencajn mallongajn filmojn de la plej nova produktado, por tiel prezenti sin en la venonta Internacia Esperanto-Kongreso. Oni petas interesiĝantojn skribi al la prezidanto de la sekcio: Georgi Stojanov-Bigor, str. Grivica 7, SOFIO 2, Bulgarujo.

- **Esperanto ĉe spiritistoj.** En la sidejo de Spiritisma Unuiĝo de Minas Gerais, en Belo Horizonte, funkcias societo de spiritistaj esperantistoj, kiuj kunvenas ĉiusemajne por studi la verkon „La Evangelio laŭ Spiritismo”, en la esperanta traduko, kaj por ekzerciĝadi en la uzado de la lingvo por oratoraj laboroj de predikantoj. Tiu kurso ne estas unika en Brazilo: ankaŭ en Rio de Janeiro kaj Ubá ekzistas similaj grupoj, kiuj preĝas, legas, komentarias spiritismajn temojn nur en Esperanto.

- **Unuajn premiojn ricevis esperantistino.** Antaŭ kelkaj jaroj nia ĉarma samideano Lacyr Schettino ricevis en S. Paŭlo unuan premion por moderna poezio, dank’ al vere bela libro. Nun denove en poezia konkurso en Rio de Janeiro ŝia nova libro atingis la unuan premion. „Diário de Noticias”, granda tagĵurnalo en la ĉefurbo, intervjuis ŝin kaj petis multajn informojn pri ŝia vivo. Ŝi responde faris sian aŭtobiografion kaj tre entuziasme parolis pri Esperanto, en kiu ŝi jam multe verkis. Unu el la poemoj de ŝia libro estas dediĉita al nia veterano Iŝmael Gomes Braga, kaj tre poezie raportas pri Esperanto.

- **Kvarmonata vojaĝo en Eŭropo.** La Doneis familio en Texas, Usono, eldonis broŝureton, kiu priskribas ilian kvarmonatan vojaĝon tra Eŭropo, dum kiu ili trairis 10,000 mejlojn en 14 landoj. „En minimume 41 privatajn hejmojn en 14 landoj,” ili skribas anglalingve, „nin invitis kiel honorajn gastojn enloĝantoj de tiuj landoj... La intima partoprenado en komunaj interesaĵoj kaj aferoj, la amikeca sentruda gastamo kaj helpemo... ebligis al ni nur ĉar ni parolis... la neŭtralan... internacian lingvon”.

- **Priesperanta kroniko en brazila gazeto.** En la brazila gazeto „Gazeta de Alagoas” aperas ĉiudimanche priesperanta kroniko verkita de nia delegito Paulino Santiago. La n-ro 14 de tiu kroniko enhavis tradukon de la artikolo de D-ro

Lapenna „La lingva problemo en la Internaciaj Organizaĵoj”, kiu aperis en „Esperanto”, oktobro 1956.

- **Esperanta resumo en jura libro.** La libro ĵusaperinta „La nature juridique et le régime fiscal des parts bénéficiaires” de Alfred Schwing enhavas resumon en Esperanto.

- **Korespondanconcoj en itala revuo.** La grava ilustrita itala revuo „Settimo Giorno” en sia rubriko „Ingresso Libero” presas adresojn de eksterlandaj korespondemuloj kun mencio de la lingvo uzota. Esperantistoj, kiuj deziras korespondi kun italoj povas sendi al la revuo siajn adresojn, menciante ke ili korespondas per la internacia lingvo Esperanto. Adreso: Leandro, Redazione di „Settimo Giorno” („Ingresso Libero”, Via Serio I, Milano.

- **Esperanto ĉe Internacia Foiro.** Ĉe la 59a Internacia Foiro de Verono, okazinta de la 10a ĝis la 19a de marto 1957, la lokaj esperantistoj ricevis standon sub la titolo „Esperanto en la servo de la Foiroj”. Samtempe la Foiro eldonis reklam-poŝtkarton en Esperanto.

- **Esperanto kaj Geonismo.** La Tria Internacia Kurso pri Esperanto kaj Geonismo okazos de la 20a ĝis la 27a de julio en Münchenwiler, Svislando.

- **Esperantistaj novaĵoj en pola gazeto.** La grava pola gazeto „Ilustrowany Kurier Polski” daŭre raportadas pri esperantaj okazaĵoj, kaj ankaŭ presas informojn ricevitaĵajn pere de Esperanto.

- **Infanoj de la mondo.** Por la paca edukado de la infanoj, la Civila Servo Internacia eldonis 12 kolorajn poŝtkartojn pri „La Infanoj de la Mondo”, kun klarigoj en franca lingvo kaj Esperanto. La serio kostas 7 rpk. Oni sin turnu al: G. Perra, 8 rue St. Charles, Lyon 3^e, Francujo.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Duc Goninaz. Ges-roj Michel Duc Goninaz kun ĝojo anoncas la naskiĝon de sia filo Philippe, la 7-an de januaro 1957.

Van Gils. Ges-roj Van Gils en IJmuiden, Nederlando, ricevis duan infanon Hans, la 10-an de februaro 1957.

Nicolai. Al ges-roj Madeleine kaj Peter Nicolai en Saarlorius, Germanujo, naskiĝis la 4-an de februaro 1957 filo Ivo, frateto por Ingrid kaj Marianne.

Postl. La 14-an de januaro 1957 ricevis la kvin parte jam denaskaj esperantistoj de nia delegito por Turnau, Stirio, Aŭstrujo, trian fratineton nomitan Monika-Serena.

Vidal. Al ges-roj Gaston Vidal (FD pri Abelbredado) naskiĝis la 14-an de februaro 1957 filo François.

Gefianĉiĝo

Zanini-Sabelli. Gefianĉiĝis S-ro Luciano Zanini, esperantisto-fervojisto el Bologna kaj Prof-ino Maria Grazia Sabelli, esperantistino el Triesto.

Geedziĝo

Lexa-Chmelíková. S-ano JUDr Jan Lexa kaj s-anino Vlasta Chmelíková, membroj de esperantista klubo „La Progreso” en České Budějovice, Ĉeĥoslovakio, geedziĝis la 30-an de decembro 1956 en la urba Nacia Komitato.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Pri tiu Servo aperas en „Esperanto” anonceto ĉiumonata ekde januaro 1956. Fondita tiudate, ĝi nun amplekse disvolviĝis kaj kontentige funkcias. Ĝia celo estas koncentrigi kiel eble plej multajn korespondajn dezirojn de esperantistoj tra la tuta mondo por havigi al ĉiu la plej taŭgan korespondanton, plej precize konforman laŭ aĝo, profesio, ktp. Mi invitas ĉiujn kursestrojn kaj unuopulojn uzi mian Servon.

Ĉiu ricevita adreso estas registrata sur aparta slipo kun ĉiuj utilaj informoj pri la korespondodeziranto kaj metata laŭ lando, sekso, aĝo, en unu el miaj sliparujoj kaj ĉiu slipo ricevas specialan numeron por distingi ĝin de la aliaj kaj ebligi rapidan ordigon kaj retrovon. Tial estas nepre necese, ke ĉiu uzanto de mia Servo sendu al mi indikojn pri si mem, almenaŭ pri sekso kaj aĝo. Por ricevi respondon de mi, kun alsendo de adreso de via estonta korespondanto, sendu al mi respondkuponon. Sed se vi deziras plurajn adresojn (el diversaj landoj) sendu tiom da respondkuponoj, kiom da petitaj adresoj, ĉar mi eble bezonas skribi plurfoje al vi, se por kelkaj landoj mi devos atendi novajn adresojn por kontentigi vin.



En la lastaj tagoj de la jaro pasigis kelkajn feriajn tagojn en Nederlando sveda samideano el Trelleborg, Olle Persson. Kvankam li gastis en alia loko, li veturis al Rotterdam por vidi la sidejon de la Asocio. Ĝuste dum lia vizito envenis la oficejon ankaŭ la portugala maristo Alfredo Martins dos Reis por aĉeti kelkajn librojn. Lia ŝipo portas lin al Rotterdam ĉiun trian monaton kaj tiam li venas vidi, kio nova estas aĉetebla. Li ne estas la sola maristo-esperantisto, kiu vizitas la oficejon. Ankaŭ argentiaj, hispanaj kaj aliaj jam trovis ĝin, ĉar la oficejo troviĝas en ĉefa strato kondukanta al la rivero.

Dum la vizito de la du samideanoj la 29-an de decembro F-ino Vermaas gaje montris al ili amason da gratulkartoj ricevitan okaze de la festotagoj.

Estas problemoj por la landoj, kie internaciaj respondkuponoj ne ekzistas. El tiuj landoj, la samideanoj sendu sian adreson (kun necesaj indikoj pri si mem), por ke mi transdonu al alilandaj petantoj, sed ili ne atendu respondon de mi. Mi estas nura privatulo kaj mia monujo ne povus elporti tian elspezon! Aŭ se ili nepre volas respondon de mi, ili sendu neuzitajn kolektindajn poŝtmarkojn de sia lando laŭ valoro de eksterlanda afranko. Ili nepre estu tre bonstataj.

La nombro de adresoj en ĉiu lando (39 landoj) ne estas sama: el kelkaj landoj mi ricevis tre multajn (Pollando, Bulgarujo, Francujo, Ĉeĥoslovakio), sed el kelkaj aliaj, tre malmultajn. Ĉiumonate en la anonceto, mi de nun indikas la landojn, kie mi havas plej multajn disponigeblajn adresojn. Se vi volas ne tro atendi (aŭ atendigi viajn lernintojn), preferu petu adresojn el tiuj landoj (nun ĉefe: Pollando, Bulgarujo kaj Francujo). Tro fantaziaj (aŭ postulemaj) personoj riskas atendi monatojn aŭ jarojn! Kursestroj ricevas laŭ peto specialajn foliojn por enskribi siajn kursanojn (indiku la nombron), ĉu por disponigo al la Servo (tio estas senpaga), ĉu por ricevi adresojn de korespondantoj (tiam sendu po unu respondkuponon por ĉiu petata adreso). Skribu al tiu nura adreso:

Daniel LUEZ
LAON (Aisne) Francujo.

Labor-Tendaro en Egiptujo

Oni sukcesas aranĝi Internacian Labor-Kampon en Egiptujo kiu komenciĝos je la fino de Februaro kaj daŭros tri monatojn kun ebleco de plua laboro post la somera varmeco. Gevolontuloj devos partopreni la laboron dum minimume ses semajnoj aŭ kvar semajnoj se oni pagas la proprajn elspezojn. Necesas ankaŭ iom da antaŭa sperto en labor-kampoj.

Jam sin anoncis dudek gevolontuloj el la jenaj landoj, Algerio, Belgujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Hindujo, Nederlando, Svedujo, Svisujo, Tunizio, Usono.

Kondiĉe ke la volontuloj estas pretaj vivi sub vere malfacilaj vivkondiĉoj, oni proponas ke ni rekonstruu malgrandan kaj tre malriĉan vilaĝon kiu troviĝas apud Port Said kaj preskaŭ tute detruigis krom la lerneja domo. Ĝi nomiĝas KAP, kaj la enloĝantoj nun loĝas amase en la lernejo. Ili atendas helpon pri la rekonstruado kaj petis ke venu volontuloj. Ŝajne oni akceptos ankaŭ virinojn kiuj povos labori kune kun la virinoj de la vilaĝo. Sveda amiko kiu esploris la situacion opinias ke estas ideala projekto.

Respondecas la Svisa Branco de S.C.I. sed Esperantistoj sin turnu al Service Civil Volontaire International, 77 Boulevard-Jean-Jaures, CLICHY (Seine) Francujo.

NEKROLOGO

Ahnfeldt. Fritjof Ahnfeldt, multjara delegito por Rödeby (Karlskrona), Svedujo, mortis la 21an de februaro 1957, 68-jara.

Buenemann. Hamburga Esperanto-Societo profunde funebras pri la morto de sia altŝatata anino S-ino Elisabeth Buenemann, edzino de la konata veteranpioniro Oscar Buenemann. Post longa, dolorplena suferado ŝi forlasis nin la 24an de januaro en aĝo de 68 jaroj. Ŝi lernis Esperanton jam en 1907.

Curti. Forpasis la 13an de januaro 1957 s-ro Arnaldo Curti, nur 47-jara. Li estis Sekretario de la Bolonja Grupo, kaj vigle laboris kiel membro de la L.K.K. en la aranĝoj de la 40a U.K.

Dessapt. Subite forpasis, la 10an de februaro 1957, la patro de nia Delegito Marius Dessapt, en aĝo de 79 jaroj.

Du Pasquier. La 1-an de februaro mortis DM de UEA, Prof. Louis-Gustave Du Pasquier, 81-jara, en Cornaux (apud Neuchâtel). Li estis iam profesoro de matematiko en la Universitato de Neuchâtel.

Düregger. S-ro Willy Düregger, Delegito en Traunstein, Germanujo, mortis 71-jara la 5an de julio 1956.

Roca Rodó. S-ro Samuel Roca Rodó, kiu lerte laboris por la Kataluna Esperantista Federacio kaj ĝiaj entreprenoj, mortis en Barcelona la 16an de januaro 1957.

Helpo por Hungarujo

Por la subteno de la helpindaj hungaraj Esperantistoj / aktivuloj, verkistoj ktp. / funkcias respondeca Helpo-Komitato en la kadro de la plej granda Esperanto-grupo en Budapeŝto, sub la kontrolo de la Landa Hungara Esperanto-Konsilantaro. La korespondadoj estu sendotaj al la sekretario, prof. Lajos Kökény, Budapeŝto, V. Balassi Bálint utca 25, kaj ankaŭ al la prezidanto de la komitato: Mária Kenesei, Budapeŝto, VI. Liszt Ferenc tér 5. — Kiam Esperantistoj turnas sin senpere al eksterlanda societo, petante ties materialan helpon, tiu ĉi societo letere informu ilin, ke la bone motivitajn petojn esploras kaj aranĝas mem la komitato en Budapeŝto. — Estas kompreneble, ke pri sendado de donacpakaĵo al propra korespondanto-amiko la Helpo-Komitato ne estas kompetenta.

Esperanto en Bulgarujo

— Urba komunuma entrepreno „Vsestrani uslugi” organizis korespondan Esperanto-kurson. Per ĝi komencis lerni Esperanton pli ol 500 personoj precipe el vilaĝoj. Bulgaraj ĵurnaloj kaj radio ofte propagandas la kurson. Por reklamoj la entrepreno elspezis pli ol 2,000 levojn. Preskaŭ ĉiuj bulgaroj jam scias kio estas Esperanto. Oni esperas, ke la kursanoj baldaŭ estos 1,000.

— En Bulgara Ministeria Konsilantaro estas malfermita Esperanto-kurso. 15 oficistoj lernas la internacian lingvon.

Kursgvidanto estas docento Vasil Ĉoĉov.

— En Sofia Fervojista lernejo komencis lerni Esperanton 300 gejunuloj.

— Bulgara poŝta administracio laŭ propono de CK de Bulg. Esperanto-Asocio planis la eldonadon de jubilea Esperanto-poŝtmarko. Ĝia eldonkvanto multe dependas de la intereso kiun montras al ĝi la esperantistoj. Adreso: Ministerio de la Poŝtoj, Fako „Novaj Poŝtmarkoj”.

— Esperanto-Societo „Albatro” en u. Varna malfermis librovendejon. Krom esperantaĵojn oni vendas ankaŭ aliajn varojn.

— Ŝtata eldonejo „Narodna Kultura” presos en Esperanto la romanon „Sub la jugo”. La eldonejo planis la eldonadon post ricevo de multaj leteroj el alilando pri eldonado de bulgaraj verkoj en Esperanto.

— Antaŭ ses jaroj radio Sofia ĉiutage dissendis en Esperanto novaĵojn pri nia lando kaj kulturo. Oni denove disaŭdigas en Esperanto, se estas intereso pri tiaj dissendoj. Lastatempe en radio Sofia venis el alilando nur du-tri leteroj kun tia peto. Utilas leteroj sendataj al: Radio Sofia, Bulgario kaj Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, Sofio.

— Esperanto-Societo „Maksim Gorki” en Sofio en 1956 havis 228 membrojn. En ĝia kadro funkcias la jenaj sekcioj: instruista, ĵurnalista, fervojista, junulara, studenta. Ĝeneralaj kunvenoj okazas ĉiusemajne. La jaran kunvenon

ĉeestis 188 membroj. En Sofio funkcias ankaŭ fervojista societo kun 76 membroj kaj blindula kun 22 membroj.

Sofia societo „M. Gorki” nun havas novan adreson: Poŝtkesto 44, Sofio.

Redakciaj Notoj

En nia decembra numero 1956, ni petis niajn legantojn informi nin per poŝtkarto pri tio, kio aparte plaĉis kaj malplaĉis en nia revuo dum tiu jaro.

Al tiu invito ni ricevis nur 22 respondojn. Oni tuj konstatas, ke tiu cifero ne donas reprezentan pocentaĵon el niaj 6000 abonantoj! Ni povas nur konjekti, ke ĝi spegulas aŭ grandan apation aŭ ĝeneralan kontentecon ĉe la legantaro: ni esperas, ke temas pri la dua alternativo... Ke oni estis ĝenerale kontentaj ni kuraĝas konkludi ankaŭ el la 22 ricevitaĵaj poŝtkartoj, kiuj plejparte esprimis ĝuste tion.

Al tiuj 22 helpemaj samideanoj ni kore dankas; ili estu certaj, ke ni zorgas pri iliaj komentojn.

★

Kontribuantoj helpus al ni, kaj ankaŭ evitigus prokraston pri pritrakto de siaj aferoj, se ili zorgus sendi siajn kontribuantojn ĉiam al la ĝusta adreso: ĉion por la ĝenerala enhavo al s-ro Auld en Johnstone; ĉion por la Oficiala Informilo, Anoncetoj kaj Reklamoj al la C.O. en Rotterdam; kaj ĉion por La Juna Vivo al s-ro Minnaja en Romo. Antaŭdankon!

Radio - Babiloj

(10)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Paperaj aplaŭdiloj jam haveblaj!

En mia 9-a Radio-Babilo (sur paĝo 172-a de la novembra numero de ĉi tiu revuo) mi sugestis, ke U.E.A. aŭ la landaj asocioj presigu aŭ stenciligu specialajn „aplaŭdilojn” laŭ la ekzemplo de la svisa radio, kiujn aŭskultintaj gesamideanoj povus sendi al la radiostacioj laŭ presaja aŭ poŝtkarta tarifo. Jam en la pasinta somero mi pensis pri tiu ideo, sed surpaperigis ĝin 27/IX/1956-a.

La U.E.A.-delegito de Trelleborg (Svedujo), s-ro B. S. Ågren, jam 9/V/1956-a havis precize la saman ideon kaj ekkorespondis pri ĝi kun s-ro G. Larglantier, Parizo, la estro de la Radio-Servo de U.E.A., kiu siavice jam kontaktis pri tio kun la ĝenerala sekretario de U.E.A. kaj la administrantino de la U.E.A.-oficejo. Ĉu pura hazardo aŭ telepatio?

La avantaĝo de tiu koincido estas, ke la estraro de U.E.A. jam ekkonis kaj aprobis tiun ideon antaŭ la aperigo de mia artikolo. En la U.E.A.-Oficejo oni jam pretigis „aplaŭdilojn” aŭ raportilojn, kiujn geraportontoj povas mendi ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C., Nederlando. La prezo estas 1 respondkuponon por 5 ekzempleroj.

Bonan efikon al via skriba aplaŭdado!

„Svislando Vokas”

Jen la konataj paroloj, per kiuj ordinare komenciĝas la Esperantlingva programo de la svisa radio-stacio Bern.

Jes, ĝi vokas. Kiu(j)n? Sendube la geesperantistojn, ĉar ĝi vokas en Esperanto. Ĉu tiuj efektive aŭskultas? Multaj

gesamideanoj, disponante pri radio-ricevilo, ne aŭdas tiun vokantan Esperanto-voĉon, ĉar ili ne scias la horon de tiu dissendo aŭ, tamen sciante ĝin, ne ĝustatempe aŭ tute ne aŭskultas.

Tio estas bedaŭrinda, ĉar la programoj, kvankam nur mallongaj (de 12.55 ĝis 13.00 kaj vespere ripetataj de 18.35

En Frislando, unu el la plej nordaj provincoj de Neder-

ĝis 18.40), estas ĉiam interesaj kaj aŭskultindaj. lando, kie mi loĝas, la svisa radio estas klare aŭdebla. Kelkfoje atmosferaj perturboj aŭ ĝenoj de apudaj ondoj difektas la dissendojn, sed ĝenerale la informoj kaj prelegetoj estas bone sekveblaj. Certe ne nur en nia loko, sed en granda areo.

Antaŭmilitaj geesperantistoj, kiuj neforgeseble memoras, ke la ĉeĥoslovaka „Verda Stacio” de Brno disradiigis tutajn teatraĵojn, operojn kaj operetojn en Esperanto, eble malatentas la mallongajn Esperanto-programetojn de la svisa radio. Sed ĉiufoje, aŭskultinte la Esperanto-programeron de Radio Bern, ni estas ĝojaj kaj fieraj, ke ni havas tian firman punkton en la Esperantodissendoj de la eŭropaj stacioj.

La voĉoj de d-ro Arthur Baur kaj prof. d-ro Edmond Privat estas tiel konataj de ni kiel tiuj de regulaj vizitantoj. La elparolo kaj stilo de tiuj radioparolistoj estas bonaj ekzemploj ne nur por gekomencantoj, sed ankaŭ por geprogresintoj. Ĉiu aŭskultado do estas tre instrua Esperanto-leciono.

Estus rekomendinde aranĝi grupan aŭskultadon antaŭ leciono aŭ kunveno. La fruvespera horo de la ripeto eble estas iom malfavora, sed tamen pli favora ol tiu de noktmeza dissendo.

La prelegetoj de prof. Privat en januaro pri la senperforteca batalmaniero de Mahatmo Gandhi estis ne nur tre instruaj kaj interesaj, sed ankaŭ edukaj kaj ĉiufoje vekis la deziron aŭskulti ankaŭ la sekvontan prelegeton. Ĉu estas pli bona kaj pli konvinka rekomendo?

S. S. de Jong



42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957
Francujo.

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves,
Marseille, Francujo. Telefonoj: PRado
55-46; FErréol 96-18. Telegrafo: Espe-
ranto.

Banko: James Rosa, Marseille.
Ĝirkonto: Groupe Esperantisto —
Marseille n-ro 156-15.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 Marto 1957

Novaj Kunvenoj: Anoncis fondkunvenon:
— Asocio de Juristoj Esperantistaj
Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Av.,
Wembley, middx Britujo.
— Internacia Polica Ligo, s-ro A.
Weide, Eggerstedtstrasse 41, Ham-
burg-Altona, Germanujo.

Antaŭkongresa aranĝo: La 13-a Interna-
cia Junularkunveno de TEJO okazos
de la 27-a de julio ĝis la 2-a de
aŭgusto 1957 en Villeneuve-les-
Avignon (Sud-Francujo). La Kun-
veno estas oficiale agnoskita de LKK
en la kadro de la antaŭkongresaj ma-
nifestacioj.

Antaŭkongreso en Parizo: La Universala
Kongreso akceptas aliĝojn al sia ofi-
ciala Antaŭkongreso en Parizo (31
julio—2 aŭgusto 1957): kotizo 600.—
fr. fr. Povas aliĝi nur kongresanoj de
la Universala Kongreso.

Dua bulteno: Fine de februaro ĝi estis
sendata al ĉiuj kongresanoj. En ĝi

troviĝas plenaj informoj por loĝado
kaj ekskursoj.

Protektanto: S-ro René Coty, prezidanto
de la Franca Respubliko, akceptis
esti protektanto de la Universala
Kongreso.

Statistiko: (ĝis fino de februaro) Alĝe-
rio 1, Aŭstrujo 13, Belujo 9, Bra-
zilo 3, Britujo 57, Bulgarujo 6, Ĉeĥo-
slovakio 2, Danlando 18, Finnlando
10, Francujo 232, Germanujo 64, His-
panujo 18, Italujo 94, Jugoslavio 28,
Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko
4, Meksikio 2, Monaklando 3, Neder-
lando 29, Norvegujo 5, Novzelando
2, Pollando 5, Portugalujo 5, Svisujo
16, Svedujo 37, Turkujo 2, Usono 3,
Venezuelo 1. Entute 673 el 29 landoj.
Gian Carlo Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

Lastmomenta informo: Francaj fervojoj
decidis doni rabaton de dudek po-
cento al ĉiuj Kongresanoj.

Honora Komitato: Protektanto: s-ro René
Coty, prezidanto de la Franca Respu-
bliko.

Membroj: S-ro Guy **Mollet**, ĉefminis-
tro. S-ro Christian **Pineau**, Ministro
por Eksterlandaj Aferoj. S-ro Gaston
Defferre, Ministro de Transmara
Francujo, urbestro de Marseille. S-ro
René **Billeres**, Ministro por Publika
Instruado. S-ro Gérard **Jacquet**, Sub-
ministro por Informado. S-ro Edouard
Herriot, iama ĉefministro, membro de
la Franca Akademio, urbestro de
Liono. S-ro Maurice **Genevoix**, mem-
bro de la Franca Akademio. S-ro
Marcel **Pagnol**, membro de la Franca
Akademio. S-ro Jules **Romains**, mem-
bro de la Franca Akademio. S-ro
Maurice **Frechet**, membro de la Scien-
ca Akademio. S-ro Gaston **Berger**,
ĝenerala direktoro por supera instru-
ado. S-ro Gaston **Roux**, ĝenerala
direktoro por junularo kaj sportoj.
S-ro André **Allix**, Rektoro de la Uni-
versitato de Liono. S-ro Albert
Bayer, emerita profesoro ĉe la Sor-
bono.

Lokaj aŭtoritatoj: S-ro Raymond
Haas Picard, Prefekto. F-ino Irma
Rapuzzi, senatanino, vicurbestro. S-ro
Denis **Padovani**, prezidanto de la re-
giona Ĝenerala Konsilantaro. S-ro
Jules **Blache**, Rektoro de la Univer-
sitato de Aix. Prof. D-ro André **Au-
dinet**, Dojeno de la Jura Fakultato.
Prof. D-ro Jean **Morin**, Dojeno de
la Medicina Fakultato. Prof. D-ro
Pierre **Choux**, Dojeno de la Scienca
Fakultato. Prof. D-ro Jean-Rémy **Pa-
lanque**, Dojeno de la Beletristika Fa-
kultato. S-ro Pierre **Keller**, Prezidanto
de la komerca ĉambro. S-ro Jacques
Lafitte, Akademia Inspektoro. S-ro
Pierre **Gacon**, estro de la akademia
fako por junularo kaj sportoj. S-ro
René **Gaborit**, estro de la departe-
menta fako, junularo kaj sportoj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO.

N-ro 292.

La 1-an de marto 1957.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro
kaj ankaŭ por komparo, je la fino de februaro 1956:

Individuaj membroj

	1956	1957
Asociaj membroj	4486	4410
MJ	574	504
MA	3167	3689
MS	592	538
Pat.	9	5
DM	298	298
HM	54	52
JMJ	—	4
JMA	—	45
	4685	5137
	9171	9547

DELEGITOJ

Alĝerio

Alger D.: Vakas.

Aŭstrujo

Wien 23 - Kalksburg FD (Kosmetiko):
Ernst Majtanić, frizisto, Breitenfurter-
strasse 533.

Britujo

Aberdeen (Aberdeenshire) D.: Vakas.
Ashton-under-Lyne (Lancs.) D.: Vakas.
Great Missenden (Buckinghamshire) D.:
Vakas.
Carshalton (Surrey) D.: Vakas.
London W.5 VD.: Vakas.
St. Annes-on-Sea (Lancs.) D.: F-ino
June Lindsay, 12, Dobson Avenue.
Newquay (Cornwall) D.: Vakas.
Sutton (Surrey) D.: S-ro Alec Venture,
sekretario, Landeck, Eaton Road.
Wolverhampton (Staffs.) D.: S-ro Cyril
C. Love, instruisto, 11, Church Walk,
Penn Fields.

Bulgarujo

Kolarovgrad FD (Ĵurnalismo): S-ro Atanas Bojaĝiev, ĵurnalisto, str. Zografska 35.

Kubrat D.: D-ro Ivan Kirĉev, kuracisto, ul. Georgi Dimitrov 18.

FD (Medicino): La D.

Sofia FD (Belarto): S-ro Kiril Drajev, ĵurnalisto, str. Oborište 77.

FD (elektraj maŝinoj): S-ro Hristo Kuĉev, elektro-inĝeniero, str. „Ŝiŝman” no. 11.

FD (Esp. propagando): S-ro Nikolaj Nikolov, oficisto, str. Anri Barbus 7.

FD (Financoj): S-ro Georgi Dolapĉiev, oficisto, bul. Klement Gotvald 54.

FD (Instruado de Esperanto): S-ro Kunĉo Vălev, redaktoro en eldonejo, str. Ĉatalĝa 5.

FD (Ĵurnalismo): S-ro Ivan Keremidĉiev, ĵurnalisto, bulv. Hristo Botev 98.

FD (Koopativismo): S-ro Evstati Cifudov, oficisto, bulv. Stalin 40.

FD (Korespondado): S-ro Assen Grigorov, ĵurnalisto, bulv. Tolbuhin 10.

FD (Lingvistiko): S-ro Simeon Hesapĉiev, filologo, str. V. Drumev no. 37, izdatelstvo „Narodna prosveta”.

FD (Medicino): S-ro Stojan Moraresku, kuracisto, str. Bojanska Reka 10.

FD (Muzikscienco): S-ro Stojan Djoudjeff, profesoro altnerna, strato Parĉeviĉ 13.

FD (Sindikataj Aferoj): S-ino Trajana Petkova, oficistino, ul. Pozitano 8.

Sviŝtov D.: S-ro Hristo Marinov, docento pri ekonomia geografio, ul. Em. Ĉakarov 3, Viŝŝ Finansovo Stopanski Institut.

FD (Ekonomia geografio): La D.

Ĉeĥoslovakujo

Liberec (Ĉeĥy) VD.: D-ro Bohuslav Jakerle, advokato, Bendlova 13a.

FD (Juro): La D.

Zilina (Slovensko) D.: S-ro Miro Závodsky, oficisto, Závodiĉ ĉ 197.

Francujo

Bouchemaine (Maine et Loire) D.: Vakas.

Chalons sur Marne (Marne) D.: Vakas.

Hyères (Var) FD (Ĝardenkulturo): Vakas.

Le Havre (Seine Maritime) FD (Filatelio): Vakas.

Paris FD (Protestantismo): S-ro Henri Dabezies, kontisto, Avenue Debidour 2.

Pfastatt (Haut-Rhin) FD (Entomologio): S-ino Hélène Lerdung, dommastrino, 3 rue des Samaritains.

Hispanujo

Cabrils (Barcelona) D.: Vakas.

Italujo

Brescia (Lombardio) D.: Vakas.

Jugoslavio

Jegunovci (NR Makedonija) D.: Vakas.

Norvegujo

Skudesneshavn (Rogaland) D.: Vakas.

Mo i Rana (Nordland) VD.: S-ro Johannes Flodmo, meĥanikisto, Hybelhus 3, Kongsy.

Pollando

Bydgoszcz (Woj. bydgoskie) D.: S-ro Józef Pawel Bieliński, oficisto, Osiedle Leśne, ul. Jaworowa bl. 23/13.

Nowy Sacz (Woj. Krakow) D.: S-ro Jerzy Dembicki, oficisto, ul. Jagiellońska 5.

FD (Skoltismo): La D.

Siedlce (Woj. warszawskie) D.: F-ino Jadwiga Paszkiewicz, rentistino, ul. Pułaskiego 29c m 5.

Sosnowiec (Silezio) D.: S-ro Czesław Wolczyk, fotografisto, ul. Zawila 13a.

Svedujo

Hälsingborg (Skåne) FD (Virinaj aferoj): S-ino Ulla Nordh, Industrig. 54.

Urugvajo

Fray Bentos (Rio Negro) D.: S-ro Aldana Policarpo, instruisto, Mendoza 3048.

FD (Instruado): La D.

Usono

Brooklyn 3 (New York) FD (Instruado): S-ro Louis Dormont, pensiita lernejestro, 123 East 35 Street.

Detroit 8 (Michigan) D.: Vakas.

New York City (New York) VD.: S-ro John L. Lewine, instruisto, no. 50 Overlook Terrace.

FD (UNO-aferoj): La D.

Stevens Point (Wisconsin) D.: S-ro Adam Bartosz, ĵurnalisto, P.O. Box 65.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

188 Ericson, S-ro Å., Sköldinge, Svedujo.

189 Fingalsson, S-ro Harald, Gisebo, Svedujo.

190 Gustafsson, S-ro Karl E., Bergvik, Svedujo.

191 Hallgren, F-ino A. L., Stockholm, Svedujo.

192 Jacobsson, S-ro Johannes, Söderfors, Kilforsen, Svedujo.

193 Karlsson, S-ro Gunnar, Vetlanda, Svedujo.

194 Larsson, F-ino Essay, Boden, Svedujo.

195 Lindberg, S-ro Fritiof, Häbygd, Svedujo.

196 Linder, S-ro Karl H., Stockholm, Svedujo.

197 Lindmark, F-ino Emy, Uppsala, Svedujo.

198 Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo.

199 Olsson, S-ro Sture, Strömsnäsbruk, Svedujo.

200 Pettersson, S-ro Folke, Huvudsta, Svedujo.

201 Schöllin, S-ro Oscar, Dyltabruk, Svedujo.

202 Söderberg, S-ro K., Uppsala, Svedujo.

203 Söderlund, S-ro B., Kumla, Svedujo.

204 Stenström, S-ro John, Jönköping, Svedujo.

205 Syrjämäki, S-ro Matti, Kumla, Svedujo.

206 Baur, D-ro A., Liebefeld-Bern, Svislando.

207 Bohren, Prof. A., Thun, Svislando.

208 Kuhn, S-ro G., Zürich, Svislando.

209 Nägeli, S-ro Heinrich, Winterthur, Svislando.

210 Barta, S-ro R., Denver, Colorado, Usono.

211 Culbert, D-ro Sidney S., Seattle, Usono.

212 Regal, S-ro Arthur E., Downers Grove, Usono.

213 Rogus, S-ro Andrew I., Oxford, Usono.

214 Vedder, S-ro Frank W., Miami, Usono.

215 Garcia Blázquez, S-ro Félix, Caracas, Venezuelo.

216 Corral, s-ro Angel M., Buenos Aires, Argentino.

217 Kelety, s-ro Luis, Villa Carlos Paz, Argentino.

218 Milkuschütz, s-ro Julio Kurt, Buenos Aires, Argentino.

219 Mathieux, s-ro F., Uccle-Bruxelles, Belgujo.

220 Staes, s-ino Elly, Koekelberg-Bruxelles, Belgujo.

221 Abreu, s-ro Modesto Belmonte, Passo Fundo, Brazilo.

222 Albuquerque, d-ro José J. de, Alagoas, Brazilo.

223 Araujo, s-ro B. Colect de, Rio de Janeiro, Brazilo.

224 Araujo, s-ro G. Soares de, Rio de Janeiro, Brazilo.

225 Araujo, f-ino I. Baggi de, Rio de Janeiro, Brazilo.

226 Augusto, s-ro O., Barra Mansa, Brazilo.

227 Bondarovsky, s-ro Elias, Barra Mansa, Brazilo.

228 Bondarovsky, s-ro Samuel, Barra Mansa, Brazilo.

229 Braga, s-ro I. Gomes, Rio de Janeiro, Brazilo.

230 Carvalho, s-ro Elmano Moreira de, Caratinga, Brazilo.

231 Caymmi, f-ino Vivaldina de M., Salvador, Brazilo.

232 Costa Filho, s-ro Francisco F. da, Rio de Janeiro, Brazilo.

233 Coutinho, s-ro A. Caetano, Rio de Janeiro, Brazilo.

234 Dionísio, s-ro Carlos H., Sao Leopoldo, Brazilo.

236 Gama, s-ro Joao de Oliveira, Juiz de Fora, Brazilo.

237 Góes, s-ro Godofredo de Araujo, Salvador, Brazilo.

238 Kneodt, s-ro Leopoldo H., Salvador, Brazilo.

239 Labbate, s-ro J., Caratinga, Brazilo.

240 Maciel, s-ro J. Couto, Salvador, Brazilo.

241. Monteiro, s-ro Mario R., Sao Paulo, Brazilo.

242 Morais, s-ro Arminio de, Rio de Janeiro, Brazilo.

243 Moreira, s-ro José, Rio de Janeiro, Brazilo.

244 Nogueira, s-ro Walter José, Rio de Janeiro, Brazilo.

245 Pádua, s-ro Geraldo, Rio de Janeiro, Brazilo.

246 Pauluk, s-ro José, Londrina, Brazilo.

247 Peccioli, s-ro Italo, Jaú, Brazilo.

248 Pinto, s-ro José Dias, Santo André, Brazilo.
249 Pitta, s-ro Hermes, Salvador, Brazilo.
250 Portes, s-ro J. E., Caratinga, Brazilo.

251 Portugal, s-ro F.J. Soares, Curitiba, Brazilo.
252 Reuben, s-ro Reinaldo, Belo Horizonte, Brazilo.

253 Romão Filho, s-ro J., Caratinga, Brazilo.
254 Rosa, s-ro N. Della, Amiricana, Brazilo.
255 Siedlecki, s-ro Kazimiro, Matinhos, Brazilo.
256 Silva, s-ro Leonidas, Bauru, Brazilo.
257 Teixeira, s-ro D., Belo Horizonte, Brazilo.
258 Teixeira, f-ino M. das Dores, Belo Horizonte, Brazilo.
259 Vaz, s-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo.
260 Villa Nova, s-ro Thomas T., Recife, Brazilo.
261 Birch, s-ro C. T. J., Norwich, Britujo.
262 Edmondson, s-ino E., Bingley, Britujo.
263 Sly, s-ro Kenneth A., Letchworth, Britujo.
264 Spry, f-ino Alice G., Bournemouth, Britujo.
265 Toms, s-ro C. H., Freshwater, Britujo.
266 Atanas, s-ro Šopov, Plovdiv, Bulgarujo.
267 Georgiev, s-ro Ivan, Gara Kostenec, Bulgarujo.
268 Lakov, s-ro Atanas, Sofia, Bulgarujo.
269 Kalčev, s-ro Kiril, Loveč, Bulgarujo.
270 Tomašovič, s-ro Josef, Košice, Ĉeĥoslovakujo.
271 Llech-Walter, s-ro R., Perpignan, Francujo.
272 Marchand, f-ino M., Paris 8, Francujo.
273 Petit, s-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo.
274 Ribillard, s-ro Jean, Nice, Francujo.
275 Flick, s-ro Werner, Werl Krs Soest, Germanujo.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	23.20-23.35	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	12.30-13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402 m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse, 23, Bern, Svislando.
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94m. P. D-ro Baur.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 33.60m., 26.50m., 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
Merkredo	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.50-23.00	Hilversum, 298m., 188m., I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.
	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	11.05-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-IV, Festivalo de la itala kanzono; 5-IV, Aprilo; 9-IV, Jozefo Garibaldi; 12-IV, Leterkesto kaj bibliografio; 16-IV, Novajoj el Italujo; 19-IV, Pasko; 23-IV, Naskiĝo de Romo; 26-IV, Torquato Tasso; 30-IV, Assisi, la urbo de S-ta Francisko — Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto — Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

Hispana Radio. Nepre notu, ke la malfrua horo de la dissendoj de la stacioj Bilbao kaj Valencia, kvankam sur mezaj ondoj ebligas aŭskultadon longdistance. Raportoj ricevitaj pravas tion. Ne forgesu provi la kaptadon de tiuj interesaj programoj kaj sendi viajn atestojn pri aŭskultado al la koncernaj stacioj. Saman rimarkon oni povas fari pri Zagreb kaj Hilversum.

PATRONOJ 1957

- 3 Domingues, d-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.
- 4 Santos, s-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo.
- 5 Brown, s-ro G. Arthur, Sao Gabriel, Brazilo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Oliveira, Kap. Jorge Campos de, Rio de Janeiro, Brazilo.
Wright, s-ro W. T. H., Auckland, Nov-Zelando.
Sandström, s-ro K. David, Umeå, Svedujo.
Heirbaut, s-ro G., Banning, Usono.
Girolodi, f-ino Adelaide, Torino, Italujo.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

P. Solin 1.90 gld., F. G. Foster 2.66 gld., F-ino J. Doering 6.33 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

E. M. Maasbommel 10.— gld., G. R. Aitchison 10.65 gld.

Al ĉiuj donacintoj koran dankon.

AL NIAJ MEMBRO-ABONANTOJ EN ĈEĤOSLOVAKUJO KAJ ALIAJ ORIENT-EŬROPAJ LANDOJ

Ni ricevis amason da plendoj, ke multajn el vi ne atingis la januara numero

1957 de la revuo „Esperanto”, dum bone alvenis la aliaj numeroj. Ni informas vin ke la januara numero estis ekspedita ĉ. la 10-a de januaro al absolute ĉiuj MA, do ankaŭ al tiuj, por kiuj ni ankoraŭ ne ricevis la kotizon 1957. Neniu ekzemplero revenis al ni. Sekve, verŝajne okazis io ĉe la poŝto. Kun bedaŭro ni devas sciigi al vi, ke ne estas eble sendi al vi novan ekzempleron. Kvankam ni presigis sufiĉe grandan kvanton, estis tia alfluo de novaj membroj en la lastaj monatoj, ke la januara numero jam estas elĉerpita. Eble, tiuj kiuj ricevis la numeron, bonvolas ĉirkuligi ĝin inter tiuj al kiuj ĝi mankas.

Ni esperas ke la sekvontaj numeroj bone atingos vin. Estos neeble, sendi la revuon al ĉiuj el vi registrite.

M. H. VERMAAS,
Dir. C.O.

ANONCETOJ

Londona Gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante **viajn** sekson, aĝon, profesion, al: Daniël LUEZ, LAON (Aisne) Francujo, enmetu unu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Interŝanĝas poŝtmarkojn diversajn tutmonde, kvanton kontraŭ kvanto. M. Kat, Montfoortlaan 13 III, Utrecht, Nederlando.

Okklasa lernejo deziras interŝanĝi knabajn desegnaĵojn kun ĉiulandaj lernejoj. Skribu al Osmogodiŝnja ŝkola „Neven Kirac”, Pula, Poŝtkesto 24, Jugoslavio. Nepre respondas.

S-ano Ferenc Dongo, dipl. esperantista instruisto serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj 13—15 jaraĝaj kaj 16—55 jaraĝaj (inter tiuj lastaj estas ankaŭ profesoroj kaj instruistoj). La adreso: Ferenc Dongo, Karadjordjeva 30, KANJIZA, Vojvodina, Jugoslavio.

Letervespero! Okaze de la fino de nia komencantkurso ni aranĝos letervesperon je la 7-a de majo 1957. Ni respondos al ĉiu korespondajo. Nia adreso: Esperanto-Grupo, Bad Hersfeld, Unter der Stiegel 27, Germanujo.

Por siaj kursanoj, 16—25 jaraj gestudentoj kaj gelaboruloj korespondi dezirantaj, vian poŝtkarton atendas SAKAMOTO Syōzi, Oosaka-hu Suita-si Senriyama Daigakumae, Japanio.

Letervesperon aranĝos Odder-Gylling Esperanto-klubo en la mezo de majo. Ĉiu ricevos respondon. Skribu multnombre al f-ino Tove Madsen, Søby pr. Hou, Jutlando, Danlando.

Hungara familio, kies familia lingvo estas esperanto, serĉas korespondantojn el la tuta mondo. Maria 16, Ivan 15 jaraĝaj. Certe ni respondos al ĉiu. Johano Tóman, Budapest III. Galagonya utca 2, Hungarujo.

Spiritisma Grupo „E.E.E.” deziras kontakti kun spiritistoj el la tuta mondo. La samidealanoj sin turnu al adreso: Caixa Postal 507, Belo Horizonte (M.G.), Brazilo.

41-jara instruisto volas korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi p.m. Respondo garantiata. Adreso: G. J. van Oorschot, Dinsdagstraat 31, Sluis, Nederlando.

Kiu sendos al mi de sia lando kaj de Sarlando tiom da diversaj uzitaj poŝtmarkoj, kiom estas rapide akireblaj, tiu sin turnu pri sama aŭ simila deziro al mi. Alois Postl, Döllach 11, Post Au, ĉe Aflenz-Kurort, Stirio, Aŭstrujo.

Por vojaĝoj al kaj tra Germanio nepre postulu la „Fernfahrplan”. Tio estas malgranda, sed tre enhavampleksa, oficiala trajntabelaro de la Germana Federacia Fervojo. En tiu ĉi horareto vi trovos **ĉiujn rapid- kaj akceltraĵojn** en kaj tra Germanio. Vi bonege povos utiligi ĝin por la preparo kaj efektivigo de viaj vojaĝoj, ĉar **ĝi enhavas 3-paĝan klarigan tekston en nia lingvo Esperanto** pri la signoj, tarifoj, transporto de pakajo ktp. Vi ricevos ĝin senpage en la vojaĝoficejoj de viaj landoj, aŭ se ne eble, postulu ĝin poŝtkarte de: Deutsche Bundesbahn, Oberbetriebsleitung West, Essen, Germanio.

Socialismo = socio organizita nur industrie sen privata posedaĵo. Civitano estas dumviva debitoro de la socio, kiun dumtempe li repagas per laboro. Forestas mono, krimuloj, armitaj civitanoj, politikistoj, milito.

Por la ekspozicio de la 5-a Kongreso de ESPERANTO-LIGO de Norda Ameriko (4—7 julio '57 en NEW YORK) oni sendu ĉian por ESP-an materialon, ankaŭ salutleterojn kaj bildkartojn filatele, preferinde bildflanke afrankitajn. Ĉiu sendinto ricevos nian dankesprimon per U.N. poŝto. Adr. Por ESPERANTO-KONGRESO, p.a. World Government Sponsors, Inc. 767 United Nations Plaza, NEW YORK 17. N.Y. USONO.

Por filatelista ekspozicio kun Esperantofako serĉas bildfl. afrank. poŝtk. aerleterojn, kongresstampojn. Ankaŭ korespondado estas dezirata. Rekompencu laŭ deziro. Wilhelm Stoll, Daimlerstr. 15, Stuttgart-Bad Cannstatt, Germanujo.

26-jara japana salajrulo deziras korespondi kun azianoj kaj nordeŭropanoj, certe respondos. Tetsuo Yokooka, 9, 3-chome, Toshima-ku, Tokyo, Japanujo.

300 div. germ. pm mi sendas kontraŭ 200 div. el via lando. Friedrich Herbst, Gartenstrasse 24, BRETTEN, Germanujo.

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj eldonas Internacian Poŝtmarkan Revuon. Kontraŭ 2 resp.kup. vi ricevos du numerojn kun artikoloj, ofertoj, interŝanĝanoncoj. Ingemar Nordin, Årjäng, Svedujo.

Deziras korespondi kaj eventuale interŝanĝi amatorfotojn kun hispana fraŭlino. S-ro From-Løvstrøm, Kirkevej 9, Nr. Aaby, Danlando.

La Navigantoj, movado por Biblia kono, famigita per kampanjoj de Billy Graham, Youth for Christ, Sveda AKO-teamo, ktp., havas nun ankaŭ Esperantan fakon. Interesa koresponda kurso — klasika laŭ enhavo sed moderna laŭ prezento — estas je via senkosta dispono. Petata estas nur respondafranko, se havigebla. La Navigantoj, Örebro, Svedujo.

Progresintoj daŭrigu lernadon de Esperanto per DIALEKTO, DIALEKTIKO de akademiano Delfi Dalmau, verkita por tiu celo: „Ĉar la aŭtoro estas lingva profesiulo kaj poligloto, ne estas mirinde ke plej interesaj estas liaj konsideroj sur pure lingva tereno”. D-ro W. Manders. 1 ekz., 10 steloj.

Bulgario. Deziras korespondi kaj interŝanĝi p.m. kun tuta mondo. Marin Anastasov Stefanov, Str. D. Blazoev 91, Tirnovo.

Instruistino urĝe bezonas infandesegnaĵojn kaj pentraĵojn (5—15 j) por propagandi esperanton en la ĉirkaŭaj lernejoj. S-ino Delgado, Glascote Infants School, Glascote, Tamworth, Staffs, Britujo.

Du teatraj direktoroj deziras laŭ sendeviza interŝanĝo viziti Jugoslavion, Bulgarujon, Ĉeĥoslovakujon kaj Germanujon por trovi eblecon organizi spektaklojn de teatro kiun ni reprezentas. Invitu nin, ni faros la samon. Vi povas senpage pasigi 2—3 semajnojn en Polujo laŭ la menciita procedo. Skribu al: Państwowy Teatr Popularny, Grudziadz, Pollando. Ni petas respondon. Feliks Klodziński, Dyrektor Teatru.

Marian Niewiarowski, ĵurnalisto kaj scenaristo, KATOWICE (Silesia), ul. Kl. Zetkin 21 m. 5, Pollando, deziras korespondi tutmonde diversteme, precipe pri ĵurnalismo, literaturo, teatro, filmo kaj interŝanĝi ilustritajn revuojn, modrevuojn, librojn, gazetojn, poŝtkartojn, esperantomaterialojn kontraŭ POLAJ objektoj. Lingvoj: esperanto, pola, rusa, germana, angla. Certe respondos.

Letervespero. Gotenburga grupo de Keli aranĝos letervesperon la 13-an de aprilo kaj deziras leterojn el ĉiuj landoj. Bonvolu skribi al: S-ino Berit Ahlqvist, Träringen 44, Göteborg Ö., Svedujo.

La Kongreso de la Federacio „Rhône Alpes” okazos la 5-an de majo en Montélimar. La organizantoj intencas fari ekspozicion. Por helpi ilin, bonvolu sendi taŭgan materialon al S-ro Llorens, profesoro, „la Verda Stelo”, route de Châteauneuf, Montélimar, Drôme, Francujo. Antaŭdankoj!

ESPERANTO

Ni disponas pri tre limigita kvanto de kompletaj binditaj jarkolektoj 1956

Prezo: por membroj 4,— gld.
„ nemembroj 8,— gld.
Mendu tuj ĉe U.E.A.!

Binditaj jarkolektoj de malnovaj jaroj

1951-52 por membroj 1,50 gld.
por nemembroj 3,— gld.
1953-55 por membroj 3,— gld.
por nemembroj 6,— gld.

(la membreco rilatas al la koncerna jaro).

Kompletigu vian serion!

Nur tre malgranda estas ankoraŭ nia provizo.

Mendu tuj ĉe U.E.A.!

VAGADO SUB PALMOJ

La streĉe interesaj dezertaj vojaĝimpresoj de

JEAN RIBILLARD

★ Nun en formo de libro!

Eksterordinare taŭga kiel legolibro en kurso de progresintoj.

Prezo: 2.50 gld.; 10 steloj

Mendu ĉe U.E.A.!

La Vojo de la Vero kaj la Saĝo

aŭ
La Vero, malkaŝita en la Biblio,
kiel io distingebla de la
Kristana Teologio

32-paĝa broŝuro

Senpage kaj aŭfrankite havebla de

A. H. BROUGHTON
The Square, Gunnislake,
Cornwall, Anglujo

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5, Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO



Hendrik Ibsen:
PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld, broŝ. 6,30 gld
aŭfranko 0,40 gld

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando

GRAVA VERKO

**MEMORLIBRO DE LA TRIA ESPERANTISTA EŬKARISTIA
MONDKUNVENO**

Okazinta en la Kadro de la

XXXVI^a INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO

Kompilita de Pastro D-ro Johano Baptisto Kao O.F.M.

Formato 19x14 cm kun 215 paĝoj de teksto plus 75 ilustraĵoj;
presita sur bonkvalita papero. Bonega libro por ĉiuj biblio-
tekoj de esperantistaj asocioj kaj tre efika instrumento
por la propagando de nia lingvo precipe en la katolikaj
medioj. Prezo: 2 usonaj dolaroj aŭ 8 ned. guldenoj aŭ
150 braz. kruzejoj plus aŭfranko. Akirebla ĉe

LIBRO-SERVO de Espero Katolika
Frederikstraat 10, DORDRECHT,
Nederlando

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Praça da Republica no. 54 sob.
RIO DE JANEIRO, Brazilo

kaj ĉe U.E.A

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj kursoj okazos

★ **21 - 28 JULIO 1957**

en la internacia altlernejo de Helsingör,
Danlando, ideala feria loko.

Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis

Ingemannsvej 9, AABYHOJ,
Danlando

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuziĉ, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj,
distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraj kostumoj nebezonaĵ.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned.
guldenoj.

MENDU ĈE UEA